




Sur la malantaŭa  
kovrilo:


- 1 branĉo de saliko  
(flavaĵ floroj)
  - 2 tusilago (verdaĵ  
folioj)
  - 3 anemono (blavaĵ  
floroj)
  - 4 frago (ruĝaj beroj)
  - 5 marĉa rubuso aŭ  
kamenoro
  - 6 branĉeto de frambo
  - 7 vakcino
  - 8 branĉo de sorpo en  
aŭtuno
- (La beroj de marĉa  
rubuso estas flavaĵaj,  
tiuj de frambo, vakci-  
nio kaj sorpo estas  
ruĝaj.)



# PRIVILEGIA VOJO

al lingvoscio:  
Esperanto

VILHO  
SETALA



Valtatie kielitaitoon



Ciuj rajtoj rezervitaj

1977

FONDUMO ESPERANTO

Helsinki

Kvara internacia eldono, 3000 ekz.  
Aliaj eldonoj: tri finnaj kaj du svedaj  
Entute presitaj 22500 ekzempleroj

Presita en Finnlando de

Novoprint Oy

1977

## Al la studgvidanto

Ĉu vi scias, ke la plej interesa kaj inteligenta maniero lerni lingvon estas studi ĝian literaturon? La sencon de ĉiu nova vorto oni divenas el la kunteksto aŭ kontrolas per nur-unulingva vortaro. Certe, tio estas ĝenerale aplikebla nur post baza studado, post kiu la novaj vortoj ne plu aperas tro dense.

Ĉi tiu libro volas esti enkondukanto al tiu metodo. Ni kreas la kondiĉojn por ĝia aplikado de la unua paĝo, sen antaŭaj konoj: la kvoto de novaj vortoj nenie superas 10 %. Ili estas eksplikataj per bildoj aŭ simboloj aŭ per klariga komento en jam lernitaj vortoj. Por rekapti de eventuale forgesitaj sencoj ni rekomendas la libron "Oportuna vortaro de ordinara Esperanto", riĉe ilustrita vortaro por komencantoj. La plej oftaj vortoj estas unuavice instruataj. La intereso de la lernanto estas kaptata per la enhavo: kontinua rakonto pri aventuroj de la herooj, bestetoj kiel simboloj de homaj infanoj.

La kontinua legado kun malmulta ripetado progresas flue kaj kiam la fino estas atingita, la lernanto povas jam ekkapti esperantan libron. Se li lernis la tutan vortprovizon (ĉirkaŭ 1400 glosoj), li povas eklegi ordinaran romanon. Li ne bezonos kontroli el Plena Vortaro pli ol 4 % da novaj vortoj. Se iu lernanto tamen enkapiĝis nur du trionojn de la glosaro, facila legolibro estas rekomendinda kiel unua paŝo; ankaŭ baze de tiel limigita vortprovizo nur ĉ. 5 % da novaj vortoj aperos en rekomendindaj tekstoj. Per ĉi tiuj paŝoj grade malfermiĝas al la lernanto la tuta esperanta literaturo sen mekanika ellerno de vortlistoj kaj gramatikaj reguloj.

En tiu senco la libro estas uzebla por memstudado. Se vi gvidas kurson, vi povas kompletigi la studadon per parolekzercoj. Por tio vi povas utiligi la ekzercojn en nia leterkurso "Koresponde laŭ la Privilegia vojo".

Se necese, la prononco estas lernebla per sondisko aŭ -bendo, riceveblaj ĉe la eldoninto. Petu prospekton per la adreso FONDUMO ESPERANTO, Esperantotie 4, 02220 Iirislahti, Finnlando.

Bonan prosperon al viaj lernantoj deziras

La aŭtoro.



Koko  
granda koko



KEKO RIKO  
mal/grandaj kokoj

1. LA KOKOJ

Jen koko. Jen granda koko. La koko estas granda.

KEKO estas koko. RIKO estas koko. Keko kaj Riko estas du kokoj. Keko estas malgranda koko. Riko estas malgranda koko.

Estas unu granda koko kaj du malgrandaj kokoj.

Unu granda koko kaj du malgrandaj kokoj estas tri kokoj.

Unu kaj unu estas du.

Du kaj unu estas tri.

La granda koko estas blanka. Keko estas blanka koko. Riko ne estas blanka. Riko estas nigra koko.

Estas du blankaj kokoj kaj unu nigra koko.

Unu granda koko estas blanka, unu malgranda koko estas blanka kaj unu malgranda koko estas nigra.



jen koko

estas =

kaj &

du 2

granda:

mal/granda

unu 1

tri 3

1 + 1 = 2

2 + 1 = 3

blanka

ne

nigra

ne ≠

A

A





nigra

Jen estas la tri kokoj.

\* \* \*

**A** estas granda  
**A E O U**  
estas grandaj

Koko:  kokoj: 


A ne estas granda, A estas malgranda. Nigra estas malblanka.



ovo

kok/ino

patro



patrino

filoj:

Riko kaj Keko

filino:  
Konjo

## 2. LA FAMILIO KOKO

Jen estas ovo kaj jen estas kokino.

La granda koko kaj Keko estas blankaj. Ankaŭ la ovo estas blanka. Ankaŭ la kokino estas blanka.

La kokino estas granda sed la ovo estas malgranda.

La kokino estas patrino. La granda koko estas patro. Sed Keko estas filo. Kaj Riko estas filo. La malgrandaj kokoj estas filoj de granda koko kaj granda kokino.

ankaŭ

sed

de

Jen estas malgranda kokino. Ankaŭ la malgranda kokino estas blanka. Sed la malgranda kokino ne estas filo. Ŝi estas filino de Patro Koko kaj Patrino Kokino. Ŝi estas fratino de Keko. Li, Keko, estas frato de la malgranda kokino.

»Keko» estas nomo de malgranda koko. Riko estas nomo de alia koko. La nomo de la malgranda kokino estas Konjo.

Keko estas frato de Riko, Riko estas frato de Keko. Ili estas fratoj unu de la alia. Ili estas ankaŭ fratoj de Konjo. Ŝi estas fratino de Keko kaj Riko. Keko, Riko kaj Konjo estas gefratoj.

La nomo de la patro estas Karlo Koko. La nomo de la patrino estas Ina Koko. Sinjoro Karlo Koko kaj sinjorino Ina Koko estas la gepatroj de Keko, Riko kaj Konjo.

Keko estas filo de la gepatroj Koko. Ankaŭ Riko estas filo de la gesinjoroj Koko. Konjo estas filino de la gepatroj Koko. Ili estas la gefiloj de gesinjoroj Koko.

Gesinjoroj Koko kaj la gefiloj Keko, Riko kaj Konjo estas la familio Koko. Ili estas la tuta familio.

KONJO  
malgranda  
kokino



ŝi (kokino, patrino, filino)

li (koko, patro, filo)  
nomo

unu kaj alia: Keko  
kaj Riko



frato                  fratino  
ge/fratoj

ili = li + li, ŝi + ŝi,  
li + ŝi

sinjoro              sinjorino  
ge/sinjoroj

familio = gepatroj  
+ gefiloj

tuta: ili kaj ne  
aliaj

La tuta familio Koko estas la du blankaj gepatroj, du blankaj gefiloj kaj unu nigra filo. Nur Riko estas nigra. Estas kvar blankaj gekokoj kaj unu nigra koko. La familio estas kvin gekokoj: la gepatroj kaj tri gefiloj.

\* \* \*

2 + 2 = 4

Du kaj du estas kvar.

2 + 3 = 5

Du kaj tri estas kvin.

### 3. DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

demando: ».....?»

Demando: Kio estas Keko?

respondo: ».....!»

Respondo: Keko estas koko!

kio? .....-o!

Demando: Kio estas Konjo?

Respondo: Konjo estas kokino!

kia? .....-a!

Demando: Kia estas Keko?

Respondo: Keko estas malgranda kaj blanka.

Demando: Kia estas Riko?

Respondo: Riko estas malgranda kaj nigra.

D: Kio estas la granda kokino?

R: Ŝi estas patrino.

D: Kia ŝi estas?

R: Ŝi estas granda kaj blanka.

D: Kio estas patro kaj patrino?

R: Ili estas gepatroj.

D: Kio estas koko kaj kokino?

R: Ili estas gekokoj.

D: Kio estas Keko kaj Riko?

R: Ili estas malgrandaj kokoj. Ili estas fratoj.

D: Kio estas Konjo kaj Riko?

R: Ili estas gefratoj. Konjo estas fratino de Riko kaj Riko estas frato de Konjo.

D: Kio estas Keko kaj Riko kaj Konjo?

R: Ili estas la gefiloj de patro Koko kaj patrino Ina Koko. Ili estas kokidoj.

kokido = filo de koko, malgranda koko

o: kio? koko kokino ovo patro patrino filo filino nomo

a: kia? granda malgranda blanka nigra

### 4. KEKO KAJ RIKO KALKULAS

Keko staras kaj Riko sidas. Keko demandas:

Kiom estas unu kaj unu?

Riko respondas:

Unu kaj unu estas du.

Keko demandas:

Kiom estas unu kaj du?

Riko respondas:

Unu kaj du estas tri.

Keko demandas:

Kiom estas du kaj du?



Keko staras, Riko sidas

demandas: »...?»

respondas: »...!»

? = 1 + 2

D: kiom? R: 3!



? = 1 & 2

D: kio? R: nombroj!  
nombroj: 1, 3, 7 &c

3 ≡ 3 samaj

? = 3 + 3

3 + 3 = 5

mal/bona kalkulo

Kio? ..... Tio!

3 + 3 > 5

pli ol

ses 6

sep 7 = 6 + 1



4 < 5

mal/pli

5 > 4

Riko respondas:

Du kaj du estas kvar.

Demando: Kio estas unu kaj du?

Respondo: Unu estas **nombro**, du estas nombro. Unu kaj du estas nombroj.

Keko: Estas **bona** respondo. Kaj kio estas 3 kaj 3?

Riko: 3 kaj 3 estas nombroj. Ili estas du **samaj** nombroj.

Keko: Kaj kio estas 4 kaj 4 kaj 4?

Riko: Ili estas tri nombroj. Ili estas **samaj**.

Keko: Sed kiom estas tri kaj tri?

Riko: Tri kaj tri estas kvin.

Keko: **Tio** ne estas bona respondo.

Tio estas malbona **kalkulo**.

Tri kaj tri estas **pli ol** kvin.

Tri kaj tri estas **ses**.

Riko: Sed kiom estas ses kaj unu?

Keko: Ses kaj unu estas **sep**. —

Kiom estas kvar kaj tri?

Riko (kalkulas): kvar, kvin, ses, sep. Estas sep!


Keko: Bone! Kio estas pli, ses **aŭ** sep?

Riko: Sep estas pli ol ses.

Keko: Kio estas **malpli**, kvar aŭ kvin?

Riko: Kvar estas malpli ol kvin, kvin estas pli ol kvar.

Keko desegnas



tabulo

tablo

benko

## 5. KEKO DESEGNAS

Jen estas nigra **tabulo**. Keko staras **apud** la tabulo.

sur

apud

Jen estas **tablo**. Riko kaj Konjo sidas apud la tablo. Ili sidas **sur benko**.

Keko desegnas.

Jen estas **streko**. Keko desegnas strekon. Li demandas:

streko /

n:

Kio estas tio?

li desegnas strekon  
tio estas streko

Riko respondas: Tio estas streko.

Keko desegnas unu strekon pli kaj demandas: Kiom **da** strekoj estas?

kiom da strekoj?  
// du strekoj!

Konjo respondas: Estas du strekoj unu apud alia.

diras: demandas,  
respondas aŭ diras

Keko **diras**: **Jes**, estas bone. **Nun** estas du strekoj. **Mi** desegnas pli da strekoj unu apud la alia. Kiom estas nun?

jes — mal/ne

nun

Keko diras: mi desegnas = Keko desegnas

Konjo: Nun estas **kelkaj** strekoj. Estas tri aŭ kvar aŭ kvin strekoj.

Kelkaj: 3 aŭ 4 aŭ 5  
////

ankoraŭ: pli kaj pli  
diru!!

multaj: pli ol kvin

//////



viŝas

neniu = nul = 0  
tie, sur la tabulo  
unua = I dua = II

kie? sur la tabulo!



A estas super B  
B estas sub A

ĝi: la streko



longa

mallonga

Keko: **Ankoraŭ** mi desegnas strekojn. **Diru**, Riko, kiom da strekoj estas?

Riko: Estas **multaj** strekoj sur la tabulo.

Keko: Nun mi **viŝas** la tabulon. **Kiom** da strekoj estas nun?

Konjo: Estas **neniu** streko sur la tabulo. **Tie** estas **nul** strekoj.

Keko: Nun mi desegnas du strekojn. La unua streko estas granda, la dua estas malgranda. Riko, diru, kia estas la granda streko?

Riko: La granda streko estas **longa**.

Keko: Kaj kia estas la malgranda streko?

Konjo: La malgranda streko estas mallonga.

Keko: **Kie** estas la longa streko?

Riko: La longa streko estas sur la tabulo, **super** la mallonga streko.

Keko: Kaj kie estas la mallonga streko?

Konjo: Ĝi estas **sub** la longa streko.

## 6. KONJO DESEGNAS

Nun Konjo ekstaras kaj Keko eksidas. Konjo nun staras apud la nigra tabulo. Ŝi diras:

Nun mi staras apud la tabulo. **Kiu** mi estas?

Riko: **Vi** estas Konjo.

Konjo: Kiu vi estas?

Riko: Mi estas Riko. Sed kion vi **faras**, Konjo?

Konjo: Mi desegnas du strekojn. Jen, kio ekestas?

Keko: Ekestas du strekoj kaj unu **angulo**.

Konjo: Mi faras ankoraŭ unu strekon. Kio nun ekestas?

Keko: Tio estas tri anguloj kaj tri strekoj.

Konjo: Jes, estas **triangulo**. Triangulo **havas** tri angulojn kaj tri flankojn. La strekoj estas la flankoj de la triangulo. — Kio estas kvar strekoj, Riko?

Riko: Kvar strekoj estas **kvarangulo**. Ĝi havas kvar angulojn kaj kvar flankojn.

Konjo: Mi desegnas sur la nigra tabulo. Kiaj estas la strekoj?

Keko: La strekoj estas blankaj.

1) sidas,



2) ekstaras,

3) staras

kiu? Konjo aŭ Riko vi: Riko diras: »vi, Konjo», aŭ »vi Keko kaj Konjo.» Faras: staras, desegnas, sidas, demandas ...

1) ne estas, 2) ekestas, 3) estas



angulo



triangulo  
havas angulojn



kvarangulo



mano; kredo en la  
mano

via mano = la  
mano de vi

ŝi desegnas per la  
mano kaj per la  
kredo

mi = mi kaj li, mi  
kaj ŝi aŭ mi kaj vi

papero



piedoj

Riko: mia piedo =  
la piedo de Riko.

Konjo: Jen estas **mano**. Kion mi havas en la mano? Ĝi estas blanka. Riko, diru vi!

Riko: En via mano estas **kredo**. Konjo: Kion mi faras per la kredo?

Keko: Vi desegnas per la kredo. Konjo: Kion vi faras, Keko kaj Riko?

Riko: Ni sidas kaj desegnas. Ni desegnas sur **papero**. Ĝi estas blanka.

Konjo: Kiaj estas la strekoj sur la blanka papero?

Keko: Ili estas nigraj.

Konjo: Kie vi sidas, Keko?

Keko: Mi sidas sur benko apud Riko.

Konjo: Kie vi sidas, Riko?

Riko: Mi sidas apud Keko. Ni sidas unu apud la alia.

Konjo: Kie estas la benko?

Keko: La benko estas sub ni.

Konjo: Kaj kio estas sub la tablo?

Riko: Sub la tablo estas la **piedoj**: miaj piedoj kaj la piedoj de Keko.

Konjo: Nun mi desegnas du kvarangulojn, unu tute apud la alia. Mi desegnas tion per kvin stre-

koj. Tri strekoj staras kaj du strekoj **kuŝas**. Keko, kion vi diras?

Keko: La kvaranguloj staras unu ĉe la alia. Iliaj flankoj **tuŝas** unu la alian.

Konjo: Nun mi desegnas trian kvarangulon. Riko, kie ĝi estas?

Riko: La tria kvarangulo staras **aparte**. Ĝia flanko ne tuŝas la aliajn kvarangulojn.

\* \* \*

**AS** kaj **N**:

— Kiu ŝi estas? — Ŝi estas Konjo.

— Kiun ŝi demandas? — Ŝi demandas lin.

— Kiu li estas? — Li estas Riko.

— Kiun li demandas? — Ŝin li demandas, Konjon.

— Kiun alian ŝi demandas? — Kekon.

— Kiun Keko demandas? Neniun (li demandas).

— Kiu alia demandas ŝin, Konjon? — Neniu alia.

— Kio estas tio? — Ĝi estas kredo.

— Kion vi havas en la mano? — Kredon mi havas en la mano; ĝin mi tuŝas per la mano: en mia mano estas ĝi.

— Kion vi faras? — Mi staras kaj desegnas.

— Kion vi desegnas? — Mi desegnas strekon.

— Mi demandas, kion vi faras.

— Mi respondas, ke mi desegnas.

(Mi respondas: »mi desegnas»).

streko staras: /  
streko kuŝas: —



unu ĉe la alia  
ili tuŝas unu la  
alian

tria = III



aparte

mia mano =  
la mano de mi

ke = >...>



Keko kun kreto =  
Keko kaj kreto  
estas unu ĉe la  
alia

apude = apud li  
parolas: diras,  
demandas &c



aŭskultas

nu


literoj: A K L  
skribas: faras  
literojn

e: kion mi skribas  
unue, tio ekestas  
la unua

post la unua estas  
la dua, post la  
dua estas la tria  
poste = post tio

bonvolu = estu bo-  
na, faru bone

la mia = mia nomo



## 7. KEKO SKRIBAS

Keko staras apud la tabulo kun kreto en la mano. La gefratoj Konjo kaj Riko sidas apude. Keko parolas kaj la aliaj aŭskultas kaj respondas.

Keko faras strekon kaj demandas:

Kion mi faras?

Konjo: Vi desegnas.

Keko: Nu, jes, mi desegnas, sed mi desegnas literojn. Jen estas tri literoj: A, O kaj E. Tio estas: mi skribas.

Riko: Kion vi skribas?

Keko: Mi skribas vian nomon. Unue mi skribas la literon R (diru: ro!). Post tio mi skribas I, trie K (diru: ko!), kaj poste O. Jen estas via nomo, RIKO.

Konjo: Skribu ankaŭ mian nomon, Keko! Bonvolu!

Keko: Jen: ko, o, no, jo, o. Tio estas KONJO. Tie estas nun du nomoj. Kaj jen la mia: ko, e, ko, o:

KEKO. Nun tie estas la nomoj de ni ĉiuj.

Riko: Skribu ankaŭ la nomojn de patro kaj patrino!

Keko: Mi skribas nur: PATRO kaj PATRINO. Tiuj ne estas nomoj, ili estas vortoj. Ankaŭ la nomoj estas vortoj, sed ne ĉiuj vortoj estas nomoj. Konjo, kiom da vortoj estas sur la tabulo?

Konjo: Estas kvin vortoj: tri nomoj kaj du aliaj vortoj.

Keko: Nun mi skribas tion per du vortoj: KVIN VORTOJ. Sed mi povas ĝin skribi ankaŭ per unu vorto kaj unu cifero: 5 VORTOJ.

Riko: Ĉu 5 ne estas nombro?

Konjo: Ankaŭ mi povas diri, ke kvin estas nombro. Kio do estas cifero?

Keko: Nombro kaj cifero ne estas samaj. Kvin estas nombro, sed la literoj »KVIN» estas vorto, la signo 5 estas cifero. Ĉu vi komprenas?

Riko: Neniu povas tion kompreni. Kvin estas nombro kaj kvin estas cifero, kaj ili ne estas samaj!

Keko: Nu, kvin estas nombro, kiun ni skribas per la cifero 5. Sed mi povas skribi la nombron

Ĉiuj malgrandaj kokoj: Keko, Riko kaj Konjo

D: kiu? R: tiu

D: kiuj? R: tiuj

kelkaj literoj kune estas vorto; ni demandas kaj respondas per vorto

nur tiu, kiu havas kretan, povas skribi sur la nigra tabulo

ciferoj: 1, 2, 3, ...

ĉu = ?

do

signoj: + ! , ? &



komprenas

$$2 + 3 = 5$$

$$2 + 2 + 1 = 5$$

la nombro kvin


dankon



1 muro karbo



2 punkto  
rondo kapo okulo



Keko venas. Riko montras: jen estas! Ni vidas per okuloj.

kvin ankaŭ per du ciferoj (kaj unu alia signo):  $2+3$ , aŭ per tri ciferoj:  $2+2+1$ . Ili ĉiuj estas la sama nombro, kvin, sed la ciferoj estas malsamaj. Ciferoj estas signoj de nombroj. Ĉu vi nun komprenas?


Riko kaj Konjo: Jes, dankon!

### 8. RIKO DESEGNAS

(1) Granda, blanka papero estas sur la muro. Riko staras apud la muro kaj havas nigran karbon en la mano. Li desegnas sur la papero. Unue li faras rondon. Poste li strekas du angulojn ĉe la rondo kaj unu punkton en la rondo. Tio estas kapo de koko. La anguloj estas la buŝo, la punkto estas unu okulo. Sur la kapo li ankoraŭ desegnas kelkajn nigrajn triangulojn, signojn de kresto.

Nun sub la kapo ekestas granda sako: la korpo de la koko. Per du strekoj Riko faras la kolon kaj poste, per kelkaj strekoj, la manon kun la fingroj kaj la piedojn. Jen estas bildo de koko.

(2) Venas Keko. Riko montras la bildon al Keko: Vidu, Keko, jen estas vi! Ĉu ne estas bona bildo?



Kolera Riko iras Karbo sur la tero Riko aŭdas ridon  
Keko for kaj Keko prenas la  
restas. ridas. karbon

Keko: Ĉu estas mia bildo? Kaj ĉu ĝi estas via desegno? Estas vere bona kaj bela bildo!

(3) Riko ridas: ha, ha, ha! Li iras for.

Keko restas. Li staras ĉe la bildo. Li estas kolera, sed li ne montras tion.

(4) Sur la tero Keko vidas la nigran karbon de Riko. Li prenas la karbon per la mano kaj plibonigas la bildon: li faras la kapon nigra.

(5) Riko nenion vidas, sed li aŭdas: ĉiuj ridas. Kio povas esti? Riko iras al la bildo por vidi, pri kio ili ridas.



bela

vere bona: neniu povas diri, ke ĝi ne estas bona

kolera: bildo 3


pli/bonigi = fari pli bona

iras por vidi: unue iras, poste povas vidi

ni parolas, demandas kaj ridas pri tio



malbela



li mem = li, neniu alia

ja ~ jes, vere!  
re/venas = venas al la sama bildo  
ne estas plu sama = ekestas alia

saluto:  
bon/venon!




ni volas ludi = ni ĉiuj diras: venu ludi!

la amikoj ludas kune, unu kun la aliaj

ili ludas per ludiloj: malgrandaj aŭtomobiloj &c

vekas = diras:  
Konjo!!!

(6) Jen, Riko vidas, ke ĉiuj staras ĉe la bildo. Li ja mem desegnas bildon de Keko kaj poste foriras. Nun li revenas, kaj ne estas plu bildo de Keko, estas bildo de Riko, kiun Keko montras kaj pri kiu li kaj la aliaj ridas!



POĈJO

la malgranda porko



amikoj

## 9. LUDO PRI STREKOJ

Jen venas POĈJO, nia amiko, la malgranda porko. Venu saluti lin! diras la Patrino.

Keko: Bonvenon, Poĉjo!

Poĉjo: Saluton, Keko!

Riko: Bonvenon! Venu ludi kun ni! Ni volas ludi kune, ĉiuj tri.

Jen la amikoj Keko, Riko kaj Poĉjo ludas kune. Ili havas aŭtomobilojn kaj aliajn ludilojn. Ili ludas per la ludiloj.

Sed venas ankaŭ Konjo. Poĉjo vokas: Konjo! Venu ludi kun ni! Ĉu vi ne volas ludi per la aŭtomobiloj!



ĉirkaŭ la tablo

en ordo: 1, 2, 3, 4, 5 ...

ne en ordo: 3, 5, 2, 1, 4, ...

Konjo: Ne, mi ne volas. Sed venu vi ĉiuj ludi kun mi! Mi diras, kion vi devas fari.

La aliaj: Bone, ni venas. Kion vi do volas, ke ni faru?

Konjo: Ni ĉiuj sidu en rondo ĉirkaŭ la tablo en jena ordo: Poĉjo, Riko, Keko kaj mi. Unue mi diras ion pri unu streko, kaj vi devas en vico diri ion pri du, tri, kvar strekoj kaj tiel plu. Mi komencas:

Unu streko estas litero I. — Daŭrigu, estas via vico, Poĉjo!

Poĉjo: Du strekoj unu sur alia estas kruco.

Riko: Tri strekoj estas triangulo!  
Keko: Kvar strekoj estas kvarangulo.

Konjo: Kvin strekoj estas stelo kun kvin pintoj.

Poĉjo: Ses strekoj estas letero.

Riko: Via letero estas fermita, sed sep strekoj estas nefermita letero.

vi devas fari = faru!!

ion = kion mi volas

vico = unu post la alia

kaj tiel plu = same pli kaj pli

komencas paroli = ek/parolas

daŭrigu = diru pli!

kruco



pinto  
stelo



fermita




ne fermita



leteroj



branĉo:  
strekoj pendas



elstaras



ok 8 = 7 + 1  
sep kaj unu  
scias = havas en la  
kapo

objektoj: tablo,  
benko, letero &c

strek/aro: multaj  
strekoj kune

enigmo: lud/deman-  
do

alta = kiu staras  
granda

2 2 2 2

similaj unu al alia

solvo = respondo al  
enigmo

facilan enigmon ni  
solvas ĉe unua  
aŭdo  
dorso kun strekoj:  
en la bildo

nenio = neniu  
objekto

Keko: **Ok** strekoj... , nu mi ne scias tian **objekton**. Sed mi diras, kio estas multaj strekoj: streko apud strekaro pendas de granda streko. Ĉu vi scias, kio estas?

Konjo: Estas branĉo. Do, mi daŭrigas per alia **enigmo**. Granda streko, **alta** streko staras sur tero. En ĉiu flanko elstaras strekoj, el ĉiuj strekoj pendas strekaroj. Kio estas?

Poĉjo: Estas alta **arbo**. Nun ankaŭ mi diras enigmon: Granda nigra bildo kuŝas sur tero, estas **simila** al arbo, ne estas arbo. Kio estas la **solvo**?

Riko: Estas **ombro** de arbo. Kaj jen enigmo: Arbo staras, du arboj staras, multaj arboj, ĉiuj staras. Kio estas?

Keko: Estas **arbaro**. Tio estas **facila** enigmo. Sed mi diras pli malfacilan enigmon: Okuloj malgrandaj, strekoj sur **dorso**. **Plugas sen plugilo**? Kian **semon** li semas? **Nenion** li semas. Kiu li estas?



plugas per plugilo sen plugilo = ne  
havas plugilon

semas semon

Poĉjo: Mi ne scias.

Riko: Ankaŭ mi ne.

Konjo: Estas ja porko!

Riko kaj Keko: Jes, estas ja

Poĉjo, estas Poĉjo!

Poĉjo: Ne ridu! Mi iras ludi per la aŭtomobiloj!

## 10. ENIGMOJ PRI KVARANGULOJ

Konjo vokas: Poĉjo, ne **koleru**! Venu al la tablo! Ni volas daŭrigi la ludon.

ne koleru = ne estu  
kolera

Poĉjo venas **ĝentile** al la tablo kaj eksidas ĉe la tablo. Konjo diras:


ĝentila estas, kiu  
ludas bone, bele  
kaj sen kolero

Nun ni ludu pri la kvaranguloj. Poĉjo, kio estas unu kvarangulo?

Poĉjo: Unu kvarangulo estas bildo sur la muro. Kaj Riko, du kvaranguloj flanko ĉe flanko, strekoj staras, strekoj kuŝas. Kio estas tio?

Riko: Ĝi estas **libro**. — Kaj nun mia enigmo: Tri kvaranguloj flanko ĉe flanko: unu kuŝas super du,

libro: bildo 2. (vidu  
paĝon 20!)



fenestro: bildoj 3, 4 kaj 6.

vitro: ni vidas tion, kio estas ali/flanke de la vitro

sekvas: venas post alia

tamen  $\surd$  mal/e, sen tio

$3 + 3 = 5$   
erara kalkulo

plus = kaj, en kalkulo

kara  $\surd$  tre bona estas prava = ne eraras

kvadrato = kvarangulo kun same longaj flankoj

rigardas = volas vidi

komuna al la du vicoj estas la kvadrato, kiu estas en unu kaj en alia

po tri = en ĉiu vico tri

unu staras apud alia, la tuto estas kvarangulo. Kio estas tio?

Keko: Ĝi estas **fenestro**. Kaj jen: kvar kvaranguloj, unu apud alia, unu super alia, en unu kvarangulo?

Konjo: Ankaŭ fenestro, kun kvar **vitroj**. Kaj nun sekvas mia enigmo: Tri kvaranguloj unu super alia, tri kvaranguloj unu apud alia, ĉiuj flanko ĉe flanko; **tamen** estas nur kvin kvaranguloj. Ĉu vi scias la solvon?

Poĉjo: Ne, mi ne scias. Ĉu vi ne **eraras**? Vi diras, ke tri **plus** tri estas kvin, sed estas ja ses?

Konjo: Ne, **kara** amiko, mi ne eraras, mi estas tute **prava**. La solvo estas kruco el kvin **kvadratoj**. **Rigardu** la bildon 5, kaj vi vidas ke unu kvadrato estas **komuna** al la vico kiu staras, kaj al la vico kiu kuŝas. — Ĝi estas malfacila enigmo.

Poĉjo: Jes, vi pravas. Sed nun sekvas facila enigmo: **Po** tri kvadratoj unu sub la alia, po du kvad-

ratoj unu apud la alia. Kio ĝi estas?

Riko: Estas ankoraŭ **foje** fenestro, nun kun ses vitroj. Sed nun mi ne povas daŭrigi. Mi ne **konas** objekton kun sep kvadratoj.

Keko: **Nek** mi tian kun ok kvadratoj.

Konjo: Do mi faros la **lastan** enigmon pri kvaranguloj: kvarangulo apud kvarangulo estas longa kvarangularo, aro kuŝas super aro, aro staras apud aro, ĉiu kun flanko ĉe flanko apud kvaranguloj. Kio ĝi estas?

Poĉjo: **Ree** vi diris al mi malfacilan enigmon. Sed, ĉu ĝi estas **reto**?

Konjo: Jes, ĝi estas reto. Kaj nun ni **finas** ĉi tiun **serion** de enigmoj.

Ĉiuj: Bone! Estas fino de la enigmoj. Ni iras ludi.

\* \* \*

### MATERIALOJ

El kio estas la libro?

La libro estas el papero. Papero estas la **materiale** de libroj.

Kio alia estas papera?

Letero estas papera. Ankaŭ bildo povas esti el papero.

fojo: unuan fojon  
Riko demandas pri fenestro, duan fojon Keko kaj trian fojon Poĉjo demandas pri fenestro

konas objekton = scias, ke estas tia objekto

nek = kaj ne

lasta = mal/unua

re/e = ankoraŭ foje, duan fojon

reto: vidu bildon

finas = diras la lastan vorton

ĉi tiu = tiu, kiu estas ĉe ni aŭ pri kiu ni parolas nun

serio: vico de similaj objektoj en ordo

materiale: tio, el kio iu faras objekton

metalo

ni skribas per skrib-  
/ilojkadro: la kvaran-  
gulo ĉirkaŭ la  
vitroj

ligno venas el arbo



ŝnuro kaj fadeno

fadeno = malgran-  
da ŝnurooni = mi kaj vi kaj  
ĉiuj

ajo

spiegulo: vidu bildon  
sur paĝo 23Kio estas la materialo de aŭto-  
mobilo?Ĝi estas **metalo**.

El kio estas la skribiloj?

Keko skribas per kreto, Riko de-  
segnas la bildon per karbo. Sed  
skribilo povas ankaŭ esti metala.

El kio estas la fenestro?

La fenestro estas el vitro. Sed  
la **kadro** de la fenestro estas **ligna**.

Kio alia estas el ligno?

Tabloj kaj benkoj estas lignaj.  
Nomu kelkajn materialojn!Materialoj estas ligno, vitro, me-  
talo, papero, kreto, karbo kaj mul-  
taj aliaj. La materialo de reto estas  
**ŝnuro** kaj **fadeno**.Ĉio, kion oni faras el papero  
estas **paperaĵoj**. — Nomu kelkajn  
paperaĵojn!Leteroj, bildoj kaj libroj estas  
paperaĵoj.

Nomu lignaĵojn!

Tablo, benko kaj fenestrokadroj  
estas lignaĵoj. Ankaŭ la nigra ta-  
bulo estas lignaĵo, kaj ankaŭ multaj  
ludiloj.


Nomu vitraĵojn!

**Fenestro** kaj **spiegulo** estas  
vitraĵoj.Konjo antaŭ spe-  
guloKonjo vidas sin =  
K. vidas Konjon

## 11. Fenestro kaj spegulo

Keko kaj Riko restas en ĉambro,  
kie ili ludas, sed Poĉjo iras en alian  
ĉambron **por** ludi.Keko diras: Ni staras ĉi tie **antaŭ**  
fenestro kaj ni vidas **ĉion** kio  
staras **malantaŭ** la fenestro; oni  
nome vidas **tra** vitro. Sed nun mi  
parolas per enigmo: Konjo staras  
antaŭ vitro, sed vidas nur **sin** mem  
en la vitro. Kie Konjo staras?Riko: Ne estas malfacile **diveni**:  
ŝi rigardas sin en spegulo. Sed  
rigardu kio **okazas** tie, malantaŭ  
la fenestro, **ekster** la ĉambro!Keko: Tie estas **knabo** kaj li  
havas rondan objekton. Estas  
**rado**! La knabo staras sed la rado  
kuŝas sur la tero. En la mano li  
havas **bastonon**. Kion li volas fari?Riko: Rigardu, nun li iras al la  
rado. Ĉu li nur nun **trovas** la  
radon?ĉambro: ĝin ĉir-  
kaŭas kvar murojli iras en ĉambron:  
poste li estas en  
ĉambroli iras **por** ludi: li  
iras kun la volo  
ludiantaŭ (bildo!)  
ĉio = ĉiuj objektoj  
mal/antaŭ =  
ali/flanke

tra

diveni = kompreni  
sen sciookazas: oni aŭ io  
farasekster = ne en (la  
ĉambro)knabo, bastono kaj  
rado  
trovas ~ ekvidas



rulas  
batas



kuras kaj pelas  
rapide



li sekvas. la rado  
jam ruliĝas mal-  
rapide



falas =  
ek/kuŝas

levas = faras, ke ĝi  
ekestu super la  
tero

star/igas = faras,  
ke ĝi staras

tre bele = pli ol  
bele

kiel bele!



radioj

kiel? tiel!

al/kuras = kuras al  
la rado

atingas = venas al  
ĝi



haltas = ne plu iras  
aŭ ruliĝas

Keko: Povas esti. Rigardu, nun  
li levas la radon kaj starigas ĝin.  
Nun li iras kaj rulas la radon per  
la bastono.

Riko: Vidu, la rado ruliĝas tre  
bele! Kiel bele ĝi ruliĝas! Nun li  
batas la radon per la bastono. Li  
kuras post la rado kaj pelas ĝin  
per la batoj. Rigardu, kiel rapide la  
rado nun ruliĝas!

Keko: Jes, oni ne povas vidi la  
radiojn de la rado. La rado ruliĝas  
tiel rapide, ke la knabo ne povas  
kuri same rapide, kiel la rado.  
Li sekvas post ĝi.

Riko: Nun la rado jam komencas  
ruliĝi malrapide. Mi jam vidas la  
radiojn. La knabo alkuras. Sed li  
ne atingas ĝin. La rado falas kaj  
nun ree kuŝas sur la tero. La rado  
ja ne povas stari, kiam ĝi haltas.

Keko: Nun la knabo ankaŭ hal-  
tas. Sed li ne falas. Li ekstaras  
apud la rado, kiu kuŝas sur la tero.

— Sed nun mi iras por rigardi,  
kion Poĉjo faras.

Riko: Ĉu vi ne havas iun radon?  
Donu al mi radon! Ankaŭ mi volas  
ludi per tia rado. Bastonon mi  
trovas facile, sed diru, ĉu vi havas  
radon?

Keko: Eble mi povas trovi ie  
radon, kiun mi povas doni al vi.  
Sed unue mi iras al Poĉjo, en la  
alian ĉambron.

## 12. POĈJO MALBONFARAS

Ni scias, ke Keko volas eniri  
la ĉambron, kie Poĉjo ludas. Ĉu  
li eble pensas, ke io estas ne en  
ordo?

Muso venas al vizito, por ludi  
kun Poĉjo. Ili iras kune en la  
ludoĉambron. Sed Poĉjo ne volas  
nun ludi per ludiloj, li volas de-  
segni. Li ne trovas paperon, sed  
la muro ja estas blanka. Estas bo-  
ne desegni sur ĝi.



iu = ĝi, li aŭ ŝi aŭ  
alia  
donas = mal/prenas  
D: kia? R: tia!

eble = povas esti  
D: kie? R: tie, ĉi tie  
aŭ ie!

mal/bon/faras =  
faras malbonon  
en/iri ĉambron =  
iri en ĉambron




pensas



muso

venas al vizito ĉe  
li = venas vidi lin  
por ludi aŭ paroli  
kun li  
ludo/ĉambro





estas malpermesite: oni diras »ne desegnu!!«  
admono: »bonvolu ne desegni!«



ĝoja, malĝoja

pendiĝas = faras tiel, ke ĝi pendas kovras ion per bildo = pendigas aŭ kuŝiĝas bildon sur ĝi  
legas libren = rigardas la skribon kaj el/parolas ĝin kondutas bone: faras ĉion bonan  
lerni: legi kaj fari ion por ekscii ĝin silentas = nenion diras  
ĉirkaŭe = ĉirkaŭ ili kial: kion vi volas per tio?  
meti = pendigi, starigi aŭ kuŝigi re/meti = meti same kiel antaŭe  
kio trov/igas = kion oni trovas  
oni rajtas = ne estas malpermesite

Ne desegnu sur la muro, diras Muso. Estas **malpermesite!**

Sed Poĉjo ne volas aŭskulti la **admonon**. Estas tiel ĝoje fari belajn bildojn.

Sed aŭskultu! diras Muso. Mi aŭdas, ke iu venas! Kion ni nun faru!

Rapide! diras Poĉjo. Ni prenu la murbildon! Mi pendigas ĝin malalte, tiel ke ĝi kovras la desegnaĵon, kaj oni ne plu povas vidi ĝin. Prenu vi libron! Ni eksidu ĉe la tablo kaj eklegu!

Nun eniras Keko. Li estas ĝoja vidi, ke la malgrandaj amikoj **kondutas** bone. Ĉu vi rigardas bildojn? Aŭ ĉu vi legas ion por lerni?

Muso kaj Poĉjo **silentas** apud la libro, kaj Keko komencas rigardi ĉirkaŭe.

Keko: Sed **kial** la bildo pendas tiel malalte? Mi volas ĝin **remeti**. — Sed kia malbono troviĝas! Vi ja scias, ke oni ne **rajtas** desegni



sur la muro! La malbonfaro **meritas punon!**

Keko prenas branĉon, sed Poĉjo forkuras tre rapide. Keko sekvas kun branĉo en la mano same rapide!

### 13. POĈJO GAJNAS PREMION

Poĉjo kuras antaŭe, Keko sekvas post li sur la vojo. Sed ĉu vi povas diveni, kion ili atingas?

Jen, oni volas **konkuri** pri rapida kuro. Ĉiuj staras sur streko, kaj nun **URSO pafas**, ĉiuj ekkuras, kaj Poĉjo kaj Keko kun la aliaj.

Poĉjo ne pensas pri la **premio**. Li **timas** pri la puno kaj pri Keko. **Tial** li kuras **plej** rapide el ĉiuj kaj venas la unua al la fino. La **celoŝnuron** li tuŝas kaj **rompas** per sia korpo, kaj tiel **venkas** la konkuron.



puno = bato aŭ alia malĝoja sekvo de la malbona faro  
li meritas punon = la puno estas prava

antaŭe = antaŭ  
Keko  
vojo = streko sur la tero, sur kiu aŭtomobiloj kaj ĉiuj aliaj iras  
konkuri = solvi, kiu kuras pli rapide ol la aliaj  
pafas: vidu bildon  
premio: objekto por tiu, kiu estas pli rapida ol la aliaj  
timas: kiu forkuras, tiu timas  
tial = sekve de tio  
plej = pli ol ĉiuj aliaj  
celo = kion oni devas atingi  
rompas = faras el ĝi du apartajn ŝnurojn  
venkas = estas la plej bona en la konkuro



kato

laŭdas: diras, ke li estas tre bona alt/aĵo = alta objekto, benko aŭ alia

li ricevas = oni donas al li re/iras hejmen: al sia ĉambro konsento: sama voĉo kaj penso gajni = ricevi en konkuro

necesa = io, kion oni devas havi, sen kio oni ne volas esti festi = kun/sidi kaj ĝoje interparoli




trinki

ŝatas = ricevas kun ĝojo




varma kafo aŭ teo

sukero: al/dono al kafo tro = pli ol bone preferas = ŝatas pli



pomoj



Due venas Keko kaj tria estas

### Kato.

Nun ĉiuj laŭdas Poĉjon kaj Keko, kaj kun Kato ili ekstaras sur altaĵo, kaj ricevas la premiojn: la unuan premion ricevas Poĉjo, la duan Keko kaj la trian Kato.

Nun la branĉo kuŝas ie sur la vojo, Keko ne plu scias kie. Li ne plu pensas pri la puno. La amikoj reiras hejmen kune, sen malkonsento.

Sed la gajnon de la premioj kaj la grandan venkon estas necese festi. Kie ni faru la feston? demandas Keko.

Ni iru hejmen, respondas Poĉjo.

Kaj kion vi volas trinki en la festo? Ĉu vi ŝatas kafon aŭ teon kun sukero? demandas Keko.

Mi ne ŝatas varman trinkaĵon. Estas jam tro varme kuri sur la vojo. Mi preferas malvarman trinkaĵon. Ĉu ni ne havas hejme pomojn? Ni faru trinkaĵon el ili.

Kaj nun Keko kaj Poĉjo iras hejmen kaj faras la tablon bela, kaj vokas ankaŭ Rikon al la festo. Ĝoje ili trinkas pomsukon pro la venko de Poĉjo.

Fino bona — ĉio bona.



### LOKOJ

En kiu loko estas Keko kaj Poĉjo?

Ili estas en la hejmo.

Kio estas la hejmo?

Ĝi estas domo. La domo konsistas el kelkaj ĉambroj. Unu ĉambro estas la ĉambro de la gepatroj. Alia ĉambro estas tiu de la infanoj. Unu ĉambro estas komuna por ĉiuj, la gepatroj kaj la infanoj. La domo estas la hejmo de la familio. La familio loĝas en sia hejmo.

En kiu loko oni konkuras pri rapida kuro?

Sur la vojo, ekster la hejmo.

Kien kuras Keko kaj Poĉjo?

Ili kuras eksteren, sur la vojon. Poste ili kuras al la celo. Fine, ili revenas hejmen.

suko = trinkaĵo el pomoj aŭ el alia donajo de arboj aŭ arbetoj ili trinkas pro la venko = kun ĝojo pri la venko

en kiu loko = kie?

domo = kelkaj ĉambroj unu ĉe la alia domo konsistas el ĉambroj = kelkaj ĉambroj kune estas domo infanoj = la gefiloj

loĝas = estas, kuŝas, sidas, staras, ludas, lernas &c


kien = al kiu loko eksteren = al la ekstero sur la vojon = al sur vojo hejmen = al la hejmo

studas = rigardas  
por lerni



maldekstra  
kaj dekstra  
manoj

ambaŭ = la du  
ungo: malmola pinto  
de fingro  
molaj: mano, kato  
malmolaj: ligno, me-  
talo, vitro



dika libro  
maldika libro

sola = unu/nura  
ceteraj: ĉiuj, kiujn  
oni ne nomas

1 2 3 4 5  
3 estas meza el  
kvin

## 14. NIA MANO

Nun ni studu niajn manojn.  
Ni havas du manojn, la **dekstran**  
kaj la **maldekstran** manon. Poĉjo,  
kion vi faras per la dekstra mano?

Poĉjo: Per la dekstra mano mi  
skribas kaj desegnas.

Keko: Ĉu vi povas ion fari per la  
maldekstra mano?

Riko: Jes, mi povas viŝi tabulon  
per la maldekstra mano.

Keko: **Ambaŭ** manoj havas kvin  
fingrojn. Ĉe la fino de ĉiu fingro  
estas **ungo**. Kia estas la ungo,  
Konjo?

Konjo: La ungo estas malmola,  
sed la tuta mano, sen la ungoj,  
estas mola.

Riko: Antaŭ ĉio la mano de kna-  
bino estas mola!

Keko: Kiel mi diras, ambaŭ  
manoj havas kvin fingrojn. Ĉu vi  
konas iliajn nomojn?

Poĉjo: La unua estas la **dika**  
fingro. Ĝi elstaras **sola** en la flanko  
de la mano. La kvar **ceteraj** staras  
kune.

Konjo: La dua fingro estas la  
montra fingro: per ĝi ni montras  
objektojn.

Riko: Kaj la tria estas la **meza**

fingro, **ĉar** ambaŭflanke de ĝi sta-  
ras du fingroj.

Konjo: Kaj la kvara estas **ringo**-  
fingro, ĉar sur ĝi ni **portas** ringojn.

Keko: Sed kiel oni nomas la  
kvinan, la plej malgrandan fingro-  
ron? Vi ne scias? Nu, ĝi estas la  
**orelfingro**, ĉar ĝi estas la sola, kiu  
povas eniri en la orelon. — Kaj fine,  
kio estas en la mezo de la fingroj?

Riko: Estas la **manplato**.

Keko: Nun kelkaj enigmoj pri la  
fingroj! Unu ungo, unu fingro,  
tuta piedo. Kio ĝi estas?

Poĉjo: **Hufo** de **ĉevalo**. — Kaj  
jen: du ungoj, du fingroj, unu pie-  
do?

Riko: Ĝi estas piedo de porko,  
kun **fendhufo**! Estas via piedo, ha  
ha ha! Mia enigmo sekvas: tri  
fingroj, unu piedo, kio estas?


Konjo: Estas iu **birdo**. La nomon  
mi ne scias.


Keko: La nomo de tiu birdo estas  
**vanelo**.

Konjo: Kvar fingroj, unu piedo,  
kio estas?

Poĉjo: Estas piedo de koko. Jen  
via **propra** piedo! Estas mia vico  
ridi! — Kaj nun: kvin ungoj, kvin  
fingroj?

ĉar = pro tio ke  
ambaŭ/flanke =  
dekstre kaj mal-  
dekstre  
portas ✓ havas

ringo 

crelo 

en/iri  
plataj estas: pape-  
ro, bildo, tabulo  
kaj aliaj



hufo ĉevalo



fend/hufo 2



vanelo

koko, kokino kaj  
vanelo estas bir-  
doj  
via **propra** = nur  
via, ne de iu alia

homoj: patro, pat-  
rino, infanoj  
 $5 + 5 = 10$  dek

Riko: Mano de homo. Sed kiom  
da fingroj havas la du manoj kune?

Keko: Dek fingrojn. Kvin kaj  
kvin estas dek.

### 15. PRI BESTOJ KAJ PIEDOJ

bestoj: porko, kato,  
muso, birdoj &c  
diversaj: unuj kaj  
aliaj  
varias: diversaj  
bestoj havas mal-  
saman nombron  
glaso: bildo 1  
certa = ne povas  
esti erara

el/diro = mallonga  
parolo  
invalido kun lam-  
/bastonoj: bildo 3  
lamas = malbone  
iras

bovo: bildo 4  
mar/stelo: bildo 5  
maro = granda

akvo  
insekto: muŝo:  
bildo 6

ekzemplo: unu el  
multaj similaj  
birdoj flugas super  
tero  
flug/ilo: per kio oni  
flugas

Diversaj bestoj havas, kiel ni  
scias, malsaman nombron da fing-  
roj. Tiel varias ankaŭ la nombro  
de piedoj. Nomu nun ĉiu en vico  
beston kun pli kaj pli granda nom-  
bro da piedoj! Poĉjo, komencu!

Poĉjo: Unu piedon havas vitra  
glaso! Ĝi certe ne estas besto...

Riko: Tamen estas bona eldiro.  
Du piedojn havas koko kaj homo.

Konjo: Tri piedojn havas inva-  
lido, kiu lamas kun du lambasto-  
noj.

Keko: Kvar piedojn havas bovo.

Poĉjo: Kvin piedojn havas mar-  
stelo.

Riko: Ses piedojn havas diversaj  
insektoj, ekzemple muŝo. Ĝi kuras  
per ses piedoj sed flugas per kvar  
flugiloj.



Konjo: Sep platoj simile al flu-  
giloj akvon batas. Tio estas fiŝo  
kiu naĝas per sep naĝiloj.

Keko: Jes, ankaŭ la flugiloj kaj  
naĝiloj estas »piedoj». Per la piedoj  
la bestoj movas sin: ili iras, kuras  
flugas kaj naĝas. — Nu, ok pie-  
dojn havas araneo.

Poĉjo: Naŭ piedoj: por tio mi  
devas trovi invalidon. Estas kankro  
al kiu mankas unu piedo.

Riko: Kaj dek piedojn do havas  
kankro. La kankro havas du  
grandajn tondilojn, per kiuj ĝi fiŝ-  
ojn fendas kaj herbojn tondas.

Keko: Se muŝo sidas sur mar-  
stelo, kiom da piedoj estas, Poĉjo?

Poĉjo: Estas kvin plus ses piedoj.  
Tio estas sama sumo kiel dek kaj  
unu.

Keko: Tre bone! Kaj dek kaj unu  
estas dek unu.

Riko: Do du muŝoj: dek du  
piedoj!

Keko: Ĝuste! Tio estas duoble  
ses.

akvo ( $H_2O$ ) estas  
ĉie ĉirkaŭ la tero  
fiŝo: bildo 7  
naĝas: movas sin  
en akvo

movas sin: iras, ku-  
ras, flugas, naĝas  
araneo: bildo 8

naŭ = 9  
kankro: bildo 10  
ĝi mankas al mi =  
mi ne havas ĝin

oni tondas per  
tondilo: rompas  
(bildo 9!)

herbo: bildo 11  
se: eble muŝo ne si-  
das sur marstelo,  
sed ni pensu, kio  
okazas, se tiel es-  
tas

$5 + 6$  faras sumon  
de 5 kaj 6

$10 + 1 = 11$   
dek unu

ĝuste = senerare  
du/oble ses =  $2 \times 6$



ezoko: la fiŝo en  
bildo 7

rampas: movas sin  
sed kuŝas sur la  
tero

serpento: bildo 12  
raŭpo: bildo 14

du/dek 20

cent 100  
ulo = iu homo aŭ  
besto  
mil 1000  
mil/pied/ulo = iu,  
kiu havas mil  
piedojn (bildo 15)  
best/eto = malgran-  
da besto  
ŝajnas al mi = mi  
vidas aŭ pensas ke  
ne eĉ: ankaŭ tio  
estas tro multe  
cent mil 100'000  
jam: ne estas nece-  
se havi pli  
naŭcent mil 900'000



mangĝi: en/buŝ/igi,  
meti en la buŝon  
999'999

Konjo: Kaj **ezoko** kaj muŝo estas  
dek tri piedoj!

Poĉjo: Jen enigmo: Dek kvar  
piedoĵ sur herbo iras, **rampas** kiel  
**serpento**?

Keko: Estas **raŭpo** de insekto.  
Sed kiom da piedoj havas du  
kankroj sume?

Riko: Ili havas **dudek** piedojn.  
Kaj tri kankroj havas tridek, kvar  
kankroj kvardek piedojn.

Konjo: Kaj dek kankroj havas  
**cent** piedojn. Sed kiom da piedoj  
havas **milpiedulo**?

Keko: Milpiedulo estas nomo de  
besteto, sed certe ĝi ne havas mil  
piedoĵn. **Ŝajnas** al mi, ke ĝi ne  
havas eĉ cent piedojn. — Nun vi  
povas paroli pri grandaj nombroj.  
Poĉjo, diru la plej grandan nom-  
bron, kiun vi povas.

Poĉjo: Se estas cent mil araneoj,  
**jam** pli mi ne volas vidi!

Konjo: Ili jam havas okcent mil  
piedoĵn kune. Sed se estas naŭcent  
mil muŝoj, ĉiu el viaj araneoj povas  
**mangĝi** po naŭ muŝojn!

Riko: Tamen ankoraŭ pli estas  
naŭcent-naŭdek-naŭ-mil naŭcent  
naŭdek naŭ muŝoj!

Keko: Kaj se alvenas unu muŝo,  
estas mil miloj da muŝoj! Tio estas  
unu **miliono**.

Konjo: Mi scias enigmon: Cent  
centoj, mil miloj, staras en akvo,  
falas sur **seka** tero. Kio estas?

Riko: Aldonu, ke ĝi **kaptas** fiŝojn!

Poĉjo: Mi solvas la enigmon!  
Estas reto, estas reto!

## 16. PROVERBOJ

**io = ia aĵo aŭ objekto**

Kio mia, tio bona.

Kio min ne tuŝas, (tio) kuŝu kiel  
(ĝi) kuŝas.

Kion vi volas, tion vi povas.

Kio iras el **koro**, tio venas al koro.

Kion mi ne sentas, pri tio mi  
silentas.

Pli bona io ol nenio.

Per nenio oni faras nenion.

Kion ni havas, tion ni ne volas.  
kion ni ne havas, tion ni **ĉasas**.

**iu persono aŭ ulo**

Ĉiu, kiu ion faras, ankaŭ eraras.

Nur tiu ne eraras, kiu nenion  
faras.

Kiu volas, tiu povas.

Kiu volas nenion, tiu havas ĉion.

Kiuj demandas, tiuj ne eraras.

1000'000 = 1000x1000  
seka = sen/akva  
al/donas = diras pli  
reto kaptas = reto  
prenas fiŝojn, tiel  
ke ili ne povas  
for/naĝi

proverbo estas io,  
kion oni diras kun  
celo, ke lernu tiu,  
kiu aŭskultas



koro

Mi sentas ĉion, kio  
tuŝas min. Ankaŭ  
bestoj sentas, sed  
objekto ne sentas  
ion.

= per tio, kio estas  
nenio, oni ne po-  
vas fari ion  
ĉasas = post/kuras  
kaj volas kapti

persono = homo  
kun nomo  
ulo: granda homo  
= grandulo  
bona homo =  
bonulo

ecoj = kvalitoj:  
bona, granda, alta,  
malbona...



frukto: tio, kion donas arbo aŭ herbo: pomo, citrono, oranĝo  
kun/uloj estas kune

kreskas: ellras el semo, kaj pli-grand/iĝas



kornoj  
tien = al tiu loko  
bon/aĵo = bona objekto  
bonaĵo vid/iĝas = oni vidas bonajn  
paradizo = loko, kie ĉio estas tre bona

kvanto = kiom, multe aŭ mal-multe  
mi opinias tion = mi pensas, ke estas tiel, kaj mi volas tion

Neniu komenco estas facila.  
Ĉiu komenco estas malfacila.  
Ĉiuj birdoj flugas kaj ĉiuj fiŝoj naĝas.

**ia = eco aŭ kvalito**  
Kia demando, tia respondo.  
Nenia malbono sen ia bono.  
Kia la semo, tia la frukto.  
Ĉia dono estas bono.  
Kiaj kunuloj, tiaj kalkuloj.

**ie = en iu loko, ien = en iun lokon, de ie = el iu loko**  
Nenie estas pli bone ol hejme.  
Malbona herbo ĉie kreskas, nenie oni ĝin semas.  
Ie eĉ la kornoj de bovoj estas pli grandaj ol ĉe ni.  
De kie vi venas, tien vi revenas.  
Tien okuloj iras, kie bonaĵo vidiĝas.  
Paradizo estas tie, kien eĉ birdo ne flugas.

**iom = ia nombro aŭ kvanto**  
Kiom da kapoj, tiom da opinioj.  
En ĉiu malbono estas iom da bono.  
Pli bona iom ol neniom.  
Kiom da koroj, tiom da volo.  
Kiom da havo, tiom da amikoj.

## Tabelvortoj

Jen sekvas en tabelo la vortoj, kiujn oni povas legi en supraj proverboj.

	demando			respondoj			ne/a	ekster tabelo
	en/havo	ncerta	certa	tuta	ne/a	ekster tabelo		
objekto, aĵo	kiu?	io	tio	ĉio	nenio	tablo, koko, homo		
persono, ulo	kiu?	iu	tiu	ĉiu	neniu	Keko, mia patro		
personoj	kiuj?	iuj	tiuj	ĉiuj	neniuj	Keko kaj Riko		
kvalito	kia?	ia	tia	ĉia	nenia	bona, granda		
kvalitoj	kiuj?	iaj	tiaj	ĉiaj	neniaj	bcnaj, grandaj		
loko, en kiu	kie?	ie	tie	ĉie	nenie	en domo, hejme		
loko, en kiun	kien?	ien	tien	ĉien	nenien	en domon, hejmen		
kvanto, nombro	kiom?	iom	tiom	(ĉiom)	neniom	tri kokoj		

**Kio ajn = pri kio oni nur povas pensi!**

ajn = ĉio, sen manko

Kio ajn estas bona, tion oni volas.  
Kiu ajn volas, tiu ankaŭ povas.  
Kie ajn iu loĝas, tie estas hejmo.  
Ne estas bone diri kian ajn veron.  
Kiom ajn vi donas, io ankoraŭ mankas.

diras veron, kiu parolas tion, kion li pensas, sentas kaj opinias

**ĉi = proksima**

proksima = apud mi, ĉe mi

Ĉi tion ni ĉiuj scias.  
Tiu estas bona, ĉi tiu pli bona.  
Malbone tie, nebone ĉi tie, bone nenie.  
Marĉo tie, mole ĉi tie, seka tero nenie.

marĉo = malseka tero



## 17. LA KORVO SUR LA PONTO

Jen estas rivero, kaj ponto super la rivero. En la rivero fluas multe da akvo.

Viro venas al la rivero. Li volas laki la ponton. En sia mano li portas lakon en ujo kaj penikon. La viro iras sur la ponton, trempas la penikon en lako kaj komencas laki la ponton.

Super la ponto flugas nigra birdo, korvo. Ĝi flugas al la ponto kaj eksidas sur branĉo de arbo sur la bordo de la rivero. La viro lakas la ponton.

Nun la ponto estas preta: la lako kuŝas bone kaj bele sur la ponto. Nenie mankas lako. La viro iras for de la ponto kun la lakujo kaj peniko. Sed la lako ankoraŭ ne estas seka kaj firma. Ĝi estas tute freŝa.

Nun la korvo flugas al la ponto. Kion ĝi volas de ĝi? Ĝi estas nur scivola. Ĝi volas ekscii, kia la ponto estas.



rivero kaj ponto

fluas = movas sin  
malsupren simile  
kiel akvo

viro kaj vir/ino es-  
tas homoj

ujo = io, en kio es-  
tas io

oni lakas per peniko

trempi = mal/sek/-  
igi en akvo aŭ

lako aŭ alia ma-  
terialo kiu fluas

korvo: tute nigra  
birdo

bordo = tero ĉe  
maro aŭ rivero

preta = nenion oni  
devas plu fari al

ĝi

iras for de io = el  
la proksimo de ĝi

lako = ujo por  
lako

firma = seka, sur  
kiu oni povas bo-  
me iri aŭ stari

freŝa: mola, mal-  
seka

sci/vola



vosto fiksiĝas



beko fiksiĝas



vosto fiksiĝas

La korvo flugas sur la ponton. Ĝi eksidas sur la ponto. Sed kio nun okazas? La vosto fiksiĝas en la freŝa lako.

La korvo volas forflugi. Ĝi klinas sin antaŭen kaj levas la voston. La vosto malfiksiĝas, sed la beko fiksiĝas.

La korvo klinas sin malantaŭen. La beko malfiksiĝas, sed la vosto fiksiĝas. Post tio la vosto liberigiĝas, sed la beko fiksiĝas. La beko liberigiĝas, la vosto fiksiĝas. La korvo ne povas liberigiĝi kaj forflugi, sed restas balanciĝi sur la ponto.

Nun la viro revenas. Li volas vidi, ĉu la ponto estas preta, ĉu la lako estas bone seka kaj firma. Sed jam malproksime li vidas la korvon sur la ponto. Li trovas bastonon sur la tero, ekprenas ĝin en la manon, levas ĝin de la tero kaj kuras al la ponto kun la bastono en la mano.

La viro alvenas. Ĉe la ponto li batas la korvon per la bastono. La

vosto: la malantaŭo  
de besto aŭ birdo

fiks/igias = ne po-  
vas foriri

for/flugi

klinas sin antaŭen  
= levas la voston

kaj mallevas la  
kapon

mal/fiksiĝas: ne es-  
tas plu fiksa

beko: firma buŝo de  
birdo

libera = ne fiksa,  
povas foriri, se ĝi  
volas



balanci = klini  
tien, reen

jam malproksime =  
li ne devas veni

pli proksimen



ek/prenas







kaptilo: ilo per kiu oni kaptas  
 vergo: longa, mal-dika bastono

J  
 hoko: metala fiks-ilo  
 vermo: sen/pieda besteto  
 larĝa   
 mallarĝa 

malalte = en malalta loko  
 venas de alte = eliras el alta loko  
 malalten = almalalta loko  
 pluvo = akvo, kiu falas el nuboj en multaj malgrandaj rondaj kvantoj (gutoj)



nubo kaj pluvo  
 eliri: iri el la domo

vosto malfiksiĝas, la piedoj malfiksiĝas. La tuta korvo liberiĝas kaj forflugas.

Nun la viro eksidas sur la bordo de la rivero, kie naĝas fiŝoj. La viro havas kaptilon: **vergon** kun fadeno kaj **hoko**. Li kaptas fiŝojn. Sur la hoko estas **vermo**, kiun la fiŝo volas manĝi. La fiŝo kaptas la vermon, la hoko fiksiĝas en la buŝo de la fiŝo, la viro levas la fiŝon kun la kaptilo el la akvo. Kaj fine la viro manĝas la fiŝon.

Esti ie, iri ien

Akvo fluas en la mallarĝa rivero en la larĝan maron — kaj akvo estas en la maro.

Kiu volas naĝi, tiu iras en la akvon, kaj tie, en la akvo, li naĝas kun la fiŝoj.


Maro estas malalte — kaj akvo fluas de alte malalten.

Ni iras sur la tero — sed pluvo falas sur la teron el nuboj.

Kiu iras unua, antaŭ la aliaj, tiu iras antaŭe — kaj ĉiu, kiu iras, iras antaŭen.

Poĉjo iras en la ĉambron, kaj li ludas en la ĉambro.

Poĉjo kaj Keko eliras sur la vojon — kaj ili kuras sur la vojo.



horloĝo



montriloj

## 18. POĈJO NE KOMPRENAS LA HORLOGON

Poĉjo volas iri eksteren por ludi. Li petas de Keko la permeson eliri. Keko respondas, ke li **volonte** permesas tion. Sed vi devas esti hejme je la sesa horo, ĉar tiam ni manĝas.

Sed kiel mi scias, kiam estas la sesa horo? demandas Poĉjo.

Rigardu, jen estas horloĝo. Ĝi montras la tempon. Metu ĝin en vian poŝon. Rigardu nun: vi vidas tie du strekojn, kiuj movas sin, kaj en rondo la numerojn de 1 ĝis 12. La strekoj estas la montriloj: ili montras la horojn kaj minutojn. La longa montrilo montras la minutojn kaj la mallonga la horojn.


Poĉjo: Sed kio estas la malgranda rondo kun tre malgranda montrilo?

Ĝi montras la sekundojn. Sed vi ne bezonas pensi pri la minutoj kaj sekundoj. Rigardu, la du montriloj nun estas en formo de angulo. Sed

eksteren: ekster la domon  
 peto: bonvolu iri permeso: iru, se vi volas  
 ordono: iru, ne restu tie!!  
 malpermeso: ne iru!!  
 volonte = kun ĝojo je la 6:a horo la horloĝo montras 6.0  
 tiam = en tiu tempo/punkto  
 kiam = en kiu tempo/punkto  
 horloĝo: bildo supre tempon montras la horloĝo  
 poŝo = malgranda sako  
 numeroj: signoj de nombroj: 1, 7, 12, 23 &c  
 de 1 ĝis 12: unua estas 1, lasta estas 12.  
 60 minutoj = unu horo  
 60 sekundoj = 1 minuto  
 vi ne bezonas tion = vi povas bone esti sen tio  
 formoj: triangula, kvadrata, ronda, ovoforma &c

rekta kurba
   
 linioj
   
 supre tre alte
   
 momento = tempo/punkto

je la sesa horo ili formas **rektan linion**. Tiam unu montrilo staras rekte **supren** kaj la alia pendas rekte malsupren. Je tiu **momento** vi devas esti hejme!



Poĉjo kuras

boato



Poĉjo remas

afero = aĵo pri kiu oni parolas
   
 ligas = fiksas per ŝnuro



forta povas multe levi
   
 laca: la afero jam estas malgranda

Poĉjo opinias, ke li komprenas la **aferon** bone. Li eliras kaj kuras al la bordo. Tie estas **boato** ĉe la bordo. Poĉjo malligas la boaton kaj komencas **remi**. Li remas per ĉiuj **fortoj** tiel ke la **ŝvito** fluas sur lia kapo. **Laca** li rigardas la horloĝon. Ni vidas, ke ĝi montras 10 minutojn antaŭ la sesa, sed Poĉjo ne komprenas tion. Li nur vidas, ke la montriloj ne formas rektan linion. Restas do ankoraŭ tempo.




Poĉjo ŝvitas



5.50 = 10 minutoj antaŭ la 6:a



6.20 = 20 min. post la 6:a



7.00 = la 7:a h.

Tamen li **turnas** la boaton kaj komencas remi hejmen. Kiam li estas ĉe la hejma bordo, li ligas la boaton kaj rigardas la horloĝon. Ankoraŭ ĝi ne formas rektan, li pensas. (Tamen estas jam 20 minutoj post la sesa, kiel ni vidas, sed tio estas enigmo al Poĉjo).


Li do eniras en la **korton** kaj prenas **sagojn** en la manon. En la dua mano li portas celtabulon. Ĝin li pendigas ĉe la muro. Kaj li komencas ĵeti sagojn al la celtabulo.

Tiel la tempo **pasas** ĝis Poĉjo sentas sin tre laca. La montriloj ankoraŭ ne staras rekte, **ho, ho!** (Estas ja la sepa horo!) Poĉjo tamen eniras kaj trovas Rikon, kiu sidas ĉe tablo kaj legas libron. Li diras: Kara amiko, nun vi estas tre malfrua: la manĝo jam estas for. Ĉu vi tamen ne komprenas la horloĝon? Vi devas nun iri **dormi** sen la **vespera** manĝo.

turnas: unue la boato montras for de la hejmo, poste li turnas, kaj ĝi montras al la hejmo

korto = tero tute proksima al la domo  
cel'tabulo

tempo pasas, montriloj moviĝas; homo pasas, la piedoj moviĝas, li alvenas, ne haltas kaj iras antaŭen ho!  
frua venas, kiu venas antaŭ la fiksita tempo, malfrua venas post la fiksita tempo  
dormi: kuŝi sen/mova, kun fermitaj okuloj  
la 6:a **vespere** = la 18:a horo



sagojn en la mano de Poĉjo



Poĉjo ĵetas





## 19. LECIONO PRI LA TEMPO

leciono = instrua horo  
 ne havas ideon = nenion scias  
 li instruas nin = li donas al ni admonojn, sciojn kaj konojn por ke ni lernu  
 krom tio = ekster tio, kion mi diras  
 tr.a = ne bezona, super/flua (pensu pri akvo, kiu fluas super la bordojn)  
 almenaŭ mi = se ne aliaj, tamen mi tago = 24 horoj  
 aprilo: tion vidu poste!  
 cif./plato: plata rondajo kun ciferoj  
 signifas = estas signoj de  
 dividas: la strek/etoj sidas unu apud alia, ĉie same proksime unu al la alia  
 ĉiuj partoj kune estas la tuto  
 inter 1 kaj 5 estas 2, 3 kaj 4

Keko: Aŭdu nun ĉiuj! Ni scias, ke Poĉjo ne havas eĉ **ideon** pri la horloĝo, kaj ni devas **instrui** ĝin al li. **Krom** tio, mi pensas ke la instruo ne estas malbona aŭ **troa** kaj superflua al vi aliaj.

Riko: Mi **almenaŭ** jam scias ĉion pri la tempo.

Keko: Ĉu vere? Diru do, kiom da **tagoj** estas en **aprilo**?

Riko: Nu, eble tridek unu.

Keko: Jen, ankaŭ vi ne scias. Sed ni komencu per la horloĝo. Vi jam scias, ke la numeroj sur la ciferplato de la horloĝo **signifas** la horojn, de 1 ĝis 12. Nu, Poĉjo, kiu montrilo montras la horojn?

Poĉjo: La mallonga. Sed kiel la longa montras la minutojn?

Keko: Ekster la ciferoj vi vidas rondon, kiun malgrandaj streketoj **dividas** en sesdek **partoj**. Tiu estas la minuta divido. **Inter** du numeroj estas ĉie kvin minutoj. Nun

vi povas legi, kion la diversaj bildoj de horloĝo montras, se mi diras, ke nul minutoj estas supre, ĉe la numero 12. (Paĝoj 41 kaj 42.)

Poĉjo: Jen, la unua montras kvin minutojn post la kvara, aŭ »kvaran horon kaj kvin minutojn».

Riko: Kaj alia montras **precize** la dekan horon. Tio estas deka horo, nul minutoj.

Konjo: Kaj tie estas kvina horo kvindek minutoj, kaj jen sesa horo dudek minutoj.

Poĉjo: Kaj fine precize la sepa horo.

Keko: Restas ankoraŭ unu horloĝo. Ĝia montrilo estas oka horo deksep minutoj. — Sed la **tagnokto** estas dudek kvar horoj. La **tago** komenciĝas je la sesa horo **matene**: tio estas la **limo** inter **nokto** kaj tago. La ombrojn de la nokto forpelas la **suno**, kiu leviĝas. La mezo de la tago, tagmezo, estas je la 12:a horo. Post tio sekvas la 13:a, la 14:a horo **ktp.** Sed, ĉar nia horloĝo havas nur 12 numerojn, je la 13:a ĝi montras la numeron 1, je la dek-kvara la numeron 2, ktp. Tiujn horojn oni nomas ankaŭ »unua posttagmeze», »dua posttagmeze»,


4.05

precize la deka = 10.0

5.50

6.20

7.0



8.17

tagnokto = tago + nokto  
 en nokto ĉio estas nigra  
 tago: la horoj 6..18  
 matena horo: la sesa 6.0  
 limo: punkto aŭ linio kie ili tuŝas unu la alian

suno



leviĝas = levas sin ktp. — kaj tiel plu post tag/meze

ktp. — Je la dekoka alvenas la vespero, ekestas nokto. La noktomeza horo estas la 24:a. Ĝi estas ankaŭ la nula horo de la nova tagnokto (0<sub>o</sub>).

Poĉjo: Estas malbona afero, ke ni devas tiel multe kalkuli pri la horoj.

Keko: Nu, vi povas diri nur la numerojn de la ciferplato, kaj laŭ bezono aldoni »antaŭtagmeze» aŭ »posttagmeze».

Riko: Sed anstataŭ la longaj vortoj »antaŭtagmeze» kaj »posttagmeze» oni ja ankaŭ povas diri ekz. »la sesa horo matene» aŭ »la kvina horo vespere», ĉu ne?

Keko: Jes, vi pravas. Tio signifas la samon.

— La leganto diru, kioma horo estas nun!

## 20. LA SEMAJNO

Sep tagoj kaj noktoj estas unu **semajno**. En la semajno estas ses **ordinaraj** tagoj. En la **ordinaraj** tagoj ni **laboras**. Ili do estas **labortagoj**. En unu tago ni ne **laboras**: tiam ni **ripozas**. La ripoza tago varias, plejparte laŭ la **religio**: la **kristanoj** havas la **dimanĉon**, la **moseanoj** la **sabaton** kaj la **maho-**

laŭ bezono =

kiam vi bezonas  
anstataŭ tio = en  
la loko de tio, por  
diri la samon  
leganto = tiu, kiu  
legas

D: Kioma? R: la 8:a!  
semajno = 7 tagoj  
la tagoj de semajno:  
dimanĉo  
lundo  
mardo  
merkredo  
ĵaŭdo  
vendredo  
sabato

la pli/multo de ĉio  
estas **ordinara** =  
ĉiutaga

labori = movi la  
manojn por pretigi  
ion

kiu ripozas, tiu **ordinare**  
kuŝas; plej bona  
ripozo estas **dormo**

plej/parte = en  
plej multaj okazoj

laŭ = sekve de  
religioj: krist/ana,  
mose/ana kaj mahomet/ana  
(Kristo, Moseo, Mahometo)

**metanoj** la **vendredon** kiel ripozan tagon.

La unua tago de la semajno estas dimanĉo. La dua tago estas **lundo**, la tria **mardo**, la kvara estas **merkredo**, la kvina estas **ĵaŭdo**, la sesa vendredo kaj la sepa sabato.

Merkredo, kiu estas la meza tago de la semajno, havas en **pluraj lingvoj** la nomon »semajnomezo».

Se nun, **hodiaŭ** estas merkredo, **hieraaŭ** estis mardo kaj **morgaaŭ** estos **ĵaŭdo**. Antaaŭhieraaŭ do estis lundo kaj postmorgaaŭ estos vendredo.

Por lerni la semajnajn tagojn ni legu kelkajn fojojn la sekvan **versajon**, ĝis ni **memoros** ĝin:

## La semajno

Jen **rimedo** por **bonstato**:

Lundo, mardo kaj merkredo  
plie **ĵaŭdo** kaj vendredo  
kaj krom tio eĉ sabato  
estu tagoj de laboro,  
sed ripozu kun **humoro**  
**dum** dimanĉo. Sen eraro  
en memoro — **kalendaro**.

mi havas kreton **kiel**  
skribilon = mi  
havas **ĝin** por  
skribi

pluraj = pli ol unu-  
du

lingvo: **parolo** kaj  
skribo, per kiu ni  
komprenas unu la  
alian

hodiaŭ = en ĉi tiu  
tago

hieraaŭ **morgaaŭ**  
kio jam estis kaj  
pasis, tio ne plu  
re/venos nek es-  
tos

antaŭ/hieraaŭ estis  
la tago antaaŭ la  
hieraaŭo

post/morgaaŭ estos la  
tago post la mor-  
gaaŭo

verso: »jen rimedo  
por bonstato»;  
kelkaj versoj estas  
vers/ajo (skrib/ajo  
el versoj)

memoras = havas  
en la kapo, povas  
re/diri kiam ajn  
rimedo: ilo aŭ vojo  
aŭ laborordo

bon/stata homo ha-  
vas fortan korpon,  
estas ĝoja kaj vo-  
las labori

pli/e = ankoraŭ pli  
kun bona humoro  
= ĝoja, sen timo  
kaj sen ŝvito

**dum** la tago = de  
la mateno ĝis la  
vespero

kalendaro = kalku-  
laro kaj divido de  
tempo



luno  
mensogas = diras  
malveron  
ĉapitro: parto de  
legajo

latino: malnova  
lingvo

ŝerco: luda diro

rimarki = vidi kaj  
ekscii  
ĉiam = ĉia/tempe  
ciklo = ronda serio  
nova = kiu antaŭe  
ne estis  
vid/ebla = kiun oni  
povas vidi  
arko = parto de  
rondo  
du.on/rondo = ½  
rondo



unua kvarono (¼)  
plenluno  
tria kvarono



1 plena, 2 neplena,  
3 malplena

Ĉu vi aŭdis diri, ke la **luno mensogas**?

Kiel vi povos legi en la sekva **ĉapitro**, la luno kreskas dum du semajnoj kaj poste malkreskas dum same longa tempo. Sed kiam ĝi malkreskas, ĝi similas al C, per kiu litero komenciĝas la vorto »kreski« laŭ la **latina** skribo. Kaj kiam la luno kreskas, ĝi havas la formon de D, kiu estas la unua litero en »dekreski« kaj »depreni«, kiuj ja signifas malkreski kaj malgrandigi.

De tio devenas la **ŝerca** diro, ke la luno mensogas.

## 21. LA MONATOJ KAJ LA JARO

Jam frue la homoj rimarkis, ke la formo de la luno varias, kaj ĉiam post paso de sama tempo revenas samaj formoj. La lunciklo konsistas el jenaj formoj: **novluno** estas tute nigra kaj nevidebla, sekvas mallarĝa **arko**, kiu iom post iom larĝiĝas ĝis duonrondo. Tiun oni nomas la unua kvarono. Poste ĝi kreskas pli, ĝis tuta rondo, kiun oni nomas **plenluno**. Sekvas malkresko, unue ĝis la tria kvarono, kaj poste ĉiam pli mallarĝa arko, ĝis ne-

videbla novluno. Tio estas la lunciklo, kiu **daŭras proksimume 27** kaj trionon da tagnoktoj.

La **monato** estis **origine** la proksimuma lunciklo, 28 tagoj. Sed la plej rimarkeblaj **ŝanĝoj** ĉirkaŭ ni, en la **natur**o, dependas de la ciklo de la suno, la **jaro**, kiu daŭras tricent sesdek kvin tagojn kaj unu kvaronon, proksimume. Nun oni volis, ke la jaro enhavu precize dek du monatojn, kaj tial la **longeco** de la monato varias inter 28 kaj 31 tagoj, kaj la jaro enhavas kvindek du semajnojn plus unu aŭ du tagojn.

Kiuj estas la nomoj de la monatoj? La unua monato estas **januaro**, la dua estas **februaro**, la tria **marto**, la kvara **aprilo**, la kvina **majo** kaj la sesa **junio**, per kio finiĝas la unua duono de la jaro. Poste sekvas la sepa monato, **julio**, la oka **aŭgusto** kaj la naŭa **septembro**. La deka monato estas **oktobro**, la dekunua **novembro** kaj la dekdua **decembro**. Tiuj nomoj estas komunaj por la plejparto de la lingvoj, sed ekzemple ne por **finnoj**.

Kiel ni jam diris, la jaro ordinaro havas 365 tagojn, sed post tri

movo daŭras 1 horon = la tempo de ekmoviĝo ĝis halto estas 1 horo proksimume = ne/precize, iom pli aŭ malpli  
monato = lunciklo  
origino = komenco, de/veno  
rimark/abl/a = kion oni povas rimarki  
ŝanĝo = mal/sam/iĝo  
naturo = tio ĉirkaŭ ni  
de/pendi = sekvi dev/ige  
jaro = sunciklo = 365 aŭ 366 tagoj = 12 monatoj = 52 semajnoj + 1 aŭ 2 tagoj  
eco = kvalito

### La monatoj:

I januaro  
II februaro  
III marto  
IV aprilo  
V majo  
VI junio  
VII julio  
VIII aŭgusto  
IX septembro  
X oktobro  
XI novembro  
XII decembro

finnoj loĝas en  
Finn/lando =  
Suomi

super/jaro havas unu tagon super la ordinara nombro, 366.

regula = simila en ĉiuj partoj  
ne/regul/aĵo = punkto neregula  
por ke vi povu = en la celo  
ebl/igi al vi  
noti: fiksi en la memoron aŭ fari malgrandan skribajon por tio

april' = aprilo; en versajo oni povas formeti »o»  
uzi = preni kiel rimedon por atingi celon  
pasinta tempo: tempo kiu estis kaj pasis  
estonta tempo: tempo, kiu venos kaj estos

nigr/igas = faras nigra  
en lumo ni vidas; tago estas luma, nokto malluma  
labor/igi = meti iun en laboron  
sem/ado estas tio, kion oni faras, kiam oni semas  
kun/manĝado = oni manĝas kune  
sata ne bezonas manĝojn; mal-sata volas manĝi  
trink/igi = doni al iu trinki

ordinaraj jaroj sekvas **superjaro**, kiu havas tricent sesdek ses tagojn. La supertago estas en februaro, kiu do tiam estas pli longa ol en ordinara jaroj.

Nia kalendaro do ne estas **regula**. Por ke vi povu bone **noti** en la memoro la neregulaĵojn de la kalendaro ni donas malgrandan versaĵon:

### La jaro

Tridek tagoj en septembro, en april', juni', novembro.

Dudek ok en februaro, dudek naŭ je superjaro.

Restas sep monatoj, kiuj havas tridek unu ĉiuj.

Diru la nomojn de la monatoj, kiuj havas tridek unu tagojn!

Nun, kiam ni konas la tutan kalendaron kaj lernis la **uzon** de **pasinta** kaj **estonta** tempo, ni povos pli libere paroli pri ĉio.

### 22. PROVERBOJ (igas, iĝas)

Nokto ĉion nigrigas, tago ĉion lumigas.

Mateno laborigas, vespero ripozigas.

Semado lacigas, frukto ĝojigas.

Kunmanĝado satigas, kunlaboro amikigas.

Vi min trinkigis, mi vin manĝigos. Nigran korvon **lavado** ne blankigas. Suno sekigas, kion pluvo malsekigas.

**Sano** rektigas, malsano kurbigas. Kio komenciĝis, tio ankaŭ finiĝos. Kun kiu vi kuniĝis, tia vi fariĝos. Korvo ne blankiĝas per lavado. Kio malsekiĝis per pluvo, tio sekiĝos en sunbrilo.

Muso satiĝis, manĝajo malboniĝis.

### 23. LA ETERNA KALENDARO

Nun ni sekvas Kekon kaj Rikon kaj iliajn amikojn tra la tuta jaro, en kalendara ordo, monaton post monato.

Sed en tiuj ĉapitroj ni volas doni ankaŭ **eternan** kalendaron, per kiu vi povas rapide trovi, kiu estas la semajna tago de kiu ajn **dato**.

Ekzistas pluraj **specoj** de eterna kalendaro. Sed la plej **simpla** estas jena:



Keko lavas la manojn; lav/ado = la laboro de tiu, kiu lavas  
sano = bona stato de la korpo  
rekt/igas = faras rekta  
kurb/igas = faras kurba  
komenc/igis = havis komencon  
fin/igis = havos finon  
kuniĝi = ludi, labori, loĝi kun iu  
fariĝas = iĝas,  
ekestas: fariĝas  
nigra = nigriĝas,  
ekestas nigra  
brila estas la sunlumo

eterna = por ĉiu tempo

dato = tago, fiksita per scigo de jaro, monato, tago  
speco = aro da similaj aĵoj  
simpla = facile komprenebla

Dimanĉaj literoj  
de 1957 ĝis 1989

G	F	E	D	C	B	A
57	58	59	60	60	61	
62	63	64	64	65	66	67
68	68	69	70	71	72	72
73	74	75	76	76	77	78
79	80	80	81	82	83	84
84	85	86	87	88	88	89

pro tio = sekve de  
tio, ĉar estas tiel

estas nomata =  
oni nomas ĝin

ripetiĝas = revenas  
simila

sufiĉas = pli ne  
estas bezone

Krist/nasko = la  
festo de la infano  
Kristo, la 25-an de  
decembro

#### JANUARO

A	B	C	D	E	F	G
1	2	3	4	5	6	7
8	9	10	11	12	13	14
15	16	17	18	19	20	21
22	23	24	25	26	27	28
29	30	31				


vintro: decembro ĝis  
februaro

Oni ordigas la tagojn de ĉiu monato sub la literoj A ĝis G. Se la jaro komenciĝas per dimanĉo, ĉiuj datoj sub la litero A estas dimanĉoj. En aliaj jaroj la dimanĉoj okazas sub alia litero, kiu **pro tio estas nomata** la »dimanĉa litero«. En superjaroj tamen estas du dimanĉaj literoj, unu por januaro kaj februaro, alia por la aliaj monatoj. En apuda tabelo vi trovas la dimanĉajn literojn por pli ol 30 jaroj, en ses linioj. Vi povas mem daŭrigi la tabelon: ĝi **ripetiĝas** ĉiam en la sesa linio pri la loko de la superjaroj kun du literoj. Tiel vi ricevas seneraran tabelon inter la jaroj 1900 kaj 2100, kaj tio eble **sufiĉas**.


Se vi havas nunjaran kalendaron, sed ne tiun por la nova jaro, kiu sekvos, memoru, ke la nova jaro komenciĝas per sama semajna tago, kiu nunjare estas je la unua de majo kaj je la Kristnasko.

#### 24. LA MIRINDA KAPTAJO DE POĈJO

Nova jaro komenciĝas per januaro. Ĝi estas jam vere **vintra** monato. Jam de longe ne falis pluvakvo el la nuboj, sed malvarmaj



neĝ/kristaloj  
kristaloj = brilaj,  
regulformaj aĵoj



sledo kaj ĉevalo

etaj **kristaloj de neĝo**. La neĝo falis jam tiel **ofte**, ke ĝi **tegis** la vojojn, arbarojn kaj **kampojn**. Fine fariĝis tiel malvarme, ke **glacio** kovris la **lagojn** kaj la maron en la **insularo**. Antaŭ la vintro kaj neĝfalo oni povis **veturi** per aŭtomobiloj kaj aliaj radveturiloj nur sur la vojoj. Sed nun la glacio kaj la neĝokovrita tero en arbaroj kaj kampoj estas bona vojo por vintraj veturiloj, **sledoj** kaj sledetoj, kiuj **glitas** sur ĝi.

Sub la glacio **vivas** ankaŭ en vintro la fiŝoj. Poĉjo diras: Eble ni povus kapti kelkajn fiŝojn, se ni elirus kun la kaptiloj!

Sed kial ne eliri? respondas Keko.

Estas tro malvarme!

Certe estas malvarme ekstere. Sed ĉe tio ja **helpas** varmaj **vestaĵoj**, instigas Keko.

Poĉjo konsentas. Li elprenas la fiŝkaptilojn el **tenejo** kaj metas ilin en **keston**. Keko prenas sledeton kaj Poĉjo eksidas sur ĝi kun benketo kaj la fiŝkaptiloj sur la **genuoj**. Kaj



vestaĵoj

eta/ tre malgranda  
ofte = mult foje  
tegi = formi supra-  
jon, / kovri  
kampo = senarba  
larga tero  
glacio: firma kovra-  
jo sur malvarma  
akvo  
lago = iom granda  
akvo, ĉirkaŭ kiu  
estas tero ĉiuflan-  
ke  
insulo = negranda  
tero, kiun ĉirkaŭas  
lago aŭ maro  
veturi = antaŭeniri  
per aŭtomobilo aŭ  
alia veturilo  
radveturilo = vetu-  
rilo kun radoj  
neĝokovrita =  
kion neĝo kovris  
glitas = sin movas  
unu sur la alia  
sen radoj  
vivas: sin movas,  
manĝas ktp.  
povus = necert-  
eco: eble ni havos  
fiŝojn eble ne  
helpas = faciligas  
instigas = antaŭen-  
igas per admonaj  
vortoj  
teni: havi en mano  
aŭ atingeble  
kesto: ligna ujo  
kvarangula  
genuoj: bildo p. 54





puŝas: formovas per la manoj energio = fonto de forto

truo en glacio:

loko, kie la glacio estas rompita kaj la akvo videbla  
fonto = loko, kie akvo fluas el la tero

atendi = resti kaj fari nenion ĝis io okazos

peco = parto el tuto  
al'logas: »petas» veni  
baldaŭ = post mallonga tempo

tiras = manevras al si per pli-malpli granda forto

tuj = sen atendo

envio = malĝojo pri tio, ke oni ne havas tion, kion alia havas

pacience = sen movigantaj sentoj

rapide ili veturas al la bordo, dum Keko skutas kaj puŝas la sledon kun forto kaj energio.

Sur la glacio la amikoj haltas. Ili faras truon en la glacio, similan al fonto sur tero, kie oni prenas akvon. Keko eksidas sur la sledeto, Poĉjo sur la benketo, kaj ambaŭ mallevas la hokon sub la glacieron.

Ofte oni devas longe sidi kaj atendi, ĉu la fiŝoj venos por kapti la vermon aŭ alian pecon da manĝaĵo, kiu kovras la hokon kaj allogas la fiŝojn. Sed nun, Keko baldaŭ sentas ke io tiras je la fadeno. Keko suprentiras la hokon kaj tuj levas belan fiŝon sur la glacieron.

Poĉjo alrigardas kun envio. Tamen, li sidas pacience kaj atendas,

Keko skutas: movas per piedo veturilon, perko sidas en la skutsledo kun la iloj sur genuoj



en la espero, ke ankaŭ li baldaŭ havos sian fiŝon.

Kaj vere ankaŭ Poĉjo fine sentas ektiron je la fadeno. Li suprentiras la kaptilon, sed ĉu vi povas diveni, kion li levas el la maro? **Boton! Kredu aŭ malkredu,** estas vere malnova, truhava boto.

Tamen, ankaŭ la boton oni devas studi. Kiu scias, pro kio ĝi fiksiĝis je la hoko.

Nekredeble! Enestas fiŝo. Granda ezoko falas el la boto.

Poĉjo estas feliĉa. Sed li diras: ni devas kunporti hejmen ankaŭ la boton. Se ni rakontus al Konjo pri la mirinda okazaĵo kaj ne povus montri la boton, ŝi certe ne kredus nin.

**Komparu** la kaptajojn de Keko kaj Poĉjo: kiu el la knaboj estis pli bonsorta?

espero = ĝoja atendo, kun certeco pri tio, ke io venos

boto: granda piedvestaĵo, vidu bildon  
kredas = opinias vera  
truhava havas truojn

ne/kredebla = kion oni ne povas kredi  
feliĉa: ĝoja pri tio, ke li havas ĉion, nenio mankas  
rakonti: pri/paroli ion, kio okazis  
mirinda: io, kion oni ne povis atendi nek esperi  
kompari: meti unu apud la alia kaj pripensi la malsimilecojn  
sorto: feliĉa aŭ malfeliĉa okazaĵo



## 25. LA KAŜLUDO


decidi: fiksi sian opinion aŭ volon post pripenso  
 kaŝi: meti ien, kie oni ne vidas ĝin  
 serĉi: rigardi ĉie, ĝis oni trovas  
 kaŝejo = loko, kie kaŝi ion  
 vestaĵejo: ĉambreto, kie oni metas vestaĵojn  
 vasta = longa kaj larĝa  
 aero: la gaso ĉirkaŭ kaj super la tero kaj ni  
 paŝo = la piedo tuŝas la teron ĉe ĉiu paŝo  
 se nenio okazas, oni komencas enui  
 spiri = enigi kaj eligi aeron  
 planko: vidu bildon  
 ronki: spiri aŭdeble dum dormo

La kokoj kaj Poĉjo decidis ludi sinkaŝon. Poĉjo devos serĉi la kokofratojn, kiuj sin kaŝos.

Poĉjo kovras la okulojn per la manoj kaj komencas kalkuli: 1, 2, 3, 4, 5, ktp. Sed Keko kaj Riko forkuras por trovi bonan kaŝejon.

Jen, la vestaĵejo estas bona kaŝejo! Keko kaj Riko sidas silente en la malvasta vestaĵejo. Ili jam baldaŭ sentas mankon de aero. Poĉjo ja devus serĉi ilin, sed neniun paŝon oni aŭdas. Kio do okazis? La kokoj jam enuas atendi, kaj eliras por spiri libere. Kaj nun Keko kaj Riko ekserĉas Poĉjon.

Jen Poĉjo sidas kun fermitaj okuloj en angulo de la ĉambro, sur la planko, kaj dormas. La ronkado malkaŝas lin jam de malproksime.



## Proverboj

e

Kiu ripetas sufiĉe, lernas plej firme.  
 Komence malfacila, fine ĝojiga.

Mi blinde pafos, eble trafos.

Rido matene, ploro vespere.

Ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme.

as, is, os, us, u, i

Infano ne ploras, patrino ne scias.

Kiu sentas — ploras, kiu vidas — ridas.

Kio estis kaj pasis, tion tempo frakasis.

Junulo ludis, maljunulo malsatos.

Kiu semis, tiu rikoltos.

De kie vi venis, tien vi reiros.

Se okulo ne vidus, koro ne avidus.

Volus kato fiŝojn, sed la akvon ĝi timas.

Ni laboru kaj esperu.

Unue lernu, poste instruu.

Ne iru du vojojn per unu fojo.

Ne vivu kiel vi volas, vivu kiel vi povas.

blinda = kiu ne vidas  
 trafi = jeti precize al la celo  
 plori: malĝoji tiel, ke akvo fluas el la okuloj  
 ĉarma = bela, alloga, ĝojiga

frakasis = rompis je malgrandaj pecoj  
 juna = kiu vivis malmultajn jarojn  
 junulo = juna homo  
 rikolti = preni la fruktojn

ci = alparolo al unu bona amiko.  
 anstataŭ »vi«

avida = kiu forte volas havi

amikoj amas unu  
la alian  
pafilo = ajo, per  
kiu oni pafas  
morti = sen/viv/iĝi

## FEBRUARO

A	B	C	D	E	F	G
			1	2	3	4
5	6	7	8	9	10	11
12	13	14	15	16	17	18
19	20	21	22	23	24	25
26	27	28	29			

leg/anto = iu, kiu  
legas  
suno estas tagmeze  
en sudo

lando = certa ter-  
parto, ofte kun  
komuna lingvo

nordo kaj sudo estas  
rektaj mal/oj

regi = superi ĉiujn  
aliajn

vetero = stato de  
la aero

frosto: forta mal-  
varmo

vento: moviĝo de  
aero

malvarmega = tre  
malvarma

portas vestaĵon =  
havas ĝin sur si  
nesto = hejmo de  
birdo

Birdo havas flugilojn por ke ĝi  
flugu.

Vi amas preni, amu ankaŭ redoni.

Ne uzu pafilon por mortigi muŝon!

Vi volus doni ovon por ricevi bovon!




ĉemizo: vestaĵo plej  
proksima al la  
korpo

jako: vestaĵo sur  
la supra parto  
de la korpo

## 26. MALDENSA ESTAS LA NESTO DE PIGO

La leganto certe jam komprenis,  
ke la familio Koko ne vivas ie en  
la sudaj landoj, ĉar januaro estas  
vintra monato. Ĝi loĝas iom mal-  
proksime en la nordo. Tie ankoraŭ  
en februaro regas vintraj veteroj:  
hodiaŭ neĝas, morgaŭ frostas kaj  
poste sekvas vento kaj neĝfalo.

Estis malvarmega tago en feb-  
ruaro. Pigo, la bela birdo, kiu ĉiam  
portas festan vestaĵon: blankan ĉe-  
mizon kaj nigran jakon, sidis en sia  
nesto kaj sentis malvarmon. La nes-



to de pigo ja estas farita el flekseblaj branĉoj, kiujn la birdo kunplektis. Ĝi do estas tre maldensa. La vento serĉis ĉiujn truojn en la muroj de la nesto kaj eniris, kaj blovis sur la dorson de Pigo. Fine Pigo komprenis, ke li devas serĉi pli varman lokon aŭ glaciĝi kaj morti.

La Pigo do ekflugis, flugadis, kaj jam vidis fumon leviĝi. Estis fumtubo de iu domo. Tie interne estis varme. Sed Pigo ne volis ĝeni la loĝantojn tie. Li simple eksidis sur la fumtubo, sur la tegmento, kaj sentis sin tie agrable varma kaj feliĉa.

Interne en la ĉambro Keko kaj Riko sidis hejmece. Pli frue dum la tago Keko fendis lignon en la lignajejo, hakante per hakilo. Nun la ligno estas metita en la kamenon, kaj ĝi brulas tie per brilanta fajro.

Tie la fratoj pasigis agrablan vesperon en la hejmo, dum frostoj regis ekstere.



farita = oni faris  
ĝin  
fleksi = kurbigi  
plekti = kunigi per  
interkrucigo  
maldensa = tra-  
blovebla  
blovi ('pri homo):  
fari venton per  
sia buŝo  
glaciĝi  
fumo: varma aero.  
kun kiu flugas  
tre ege malgran-  
daj karboj  
tubo: longa tra-  
ejo por fumo, akvo  
ktp.

interne: inter kvar  
muroj

ĝeni: havigi laboron  
aŭ malfacilaĵojn  
al iu

tegmento = supraĵo  
de domo

bona sento estas  
agrabla

hejmece: kun hej-  
ma sento

lign/ajejo

hakilo: metala la-  
borilo, per kiu oni  
batante fendas  
lignon

hak/ante = per ha-  
kado

met/ita = oni metis  
ĝin

kameno estas fajr-  
ejo en ĉambro

kiam ligno fariĝas  
tre varma kaj

foriras kiel fumo,  
ĝi brulas per fajro

grimpi =  
supreniri  
malfacilan  
vojon

ŝtupetaro



ĉesi = finiĝi

subite: rapide, sen  
paso de tempo

difekti = malbonigi  
hela = pli simila al  
blanka ol al nigra  
skrapi = forviŝi per  
forto ion el la  
supraĵo

iri laŭ io: sekvi  
proksime al ĝi iom  
longan vojon

kaŭzo de io estas  
tio, pro kio ĝi  
okazas

fermi: nebligi trai-  
ron

komforto: agraba,  
hejmeca, nelaciga  
sento

honto: malagrabia  
sento pri nefarita  
devo

gasto = ali/ulo kiu  
venas amike al  
nia hejmo

inviti = peti eniri  
proponi = montri  
ion al iu, por ke  
li uzu ĝin

seĝo, sur kiu oni  
sidas

kontenta -- kiu ne-  
nion plu volas  
havi

Sed la agrabla stato ĉesis subite.

— Kial eniras fumo en la ĉambron?  
Ĝi ja difektas la helajn murojn de  
la hejmo! Ii tute nigriĝos! Mi devos  
grimpi sur la tegmenton kaj skrapi  
la tubon, diris Keko.

Kaj Keko eliris kaj suprengrimpis  
laŭ ŝtupetaro. Sur la tegmento li  
trovis la kaŭzon de la malbono: La  
tubon fermas Pigo!

Pigo devas foriri, aŭ estos nenia  
komforto interne. Sed kion fari?  
Estus honto forpeli gaston en la  
froston. Keko decidis inviti lin en  
la ĉambron.

Keko proponis al Pigo benketon.  
Li mem kaj Riko eksidis sur seĝoj.  
Kontente Pigo eksidas ĉe la varma  
fajro, en kiu brulas la ligno, kiun  
Keko hakis pli frue.

La fajro agrable varmigas tiel  
la gaston kiel la hejmanojn.

Baldaŭ Konjo eniros kun bolanta  
akvo kaj teo en la ĉambron, kaj  
tiam estos vera festo malgraŭ la  
frostoj ekstera. Kaj en la amika  
rondo Pigo forgesas sian maldensan  
neston en la arbaro.

akvo **bolas** je 100°C,  
kiam **vaporo** forte  
eliras  
malgraŭ tio = eĉ  
se tio volas mal-  
helpi  
forgesas: ne plu  
memoras

50 20 10 5

mono: moneroj

## 27. KEKO KAJ RIKO ACETAS TERPOMOJN

Estis fine de februaro. La terpo-  
moj el la propra kampeto de la  
kokoj jam antaŭ kelka tempo fi-  
niĝis, kaj jam tedis la fratojn vivi  
longe sen la preferata ĉiutaga  
manĝaĵo. Tial la frata paro decidis  
ekiri al la afabla Urso por aĉeti  
terpomojn. Li ja posedas grandan  
kampon, kie kreskis multe da ter-  
pomoj en la pasinta jaro.

Kelkfoje en februaro estas milda  
vetero. Tiel estis ankaŭ en tiu ma-  
teno. La ĉielo estis sennuba, tute  
blua, kaj la suno brilis ridetante  
sur la neĝamasoj. Estis tamen iom  
da frostoj, kaj la neĝon tegis firma  
krusto, kiu formiĝis dum la nokta

terpomo = ovofor-  
ma frukto, kiu  
kreskas en la tero,  
kiun oni pretigas  
por manĝaĵo en  
bolanta akvo

tudo: malagrabio  
pro longa daŭro  
preferata: kiun oni  
preferas

paro: du personoj  
kune  
afabla: amika, help-  
ema

aĉeti: interŝangi per  
mono (vidu bil-  
don!)

posedas: havas kiel  
propraĵon

pasinta = kiu pasis  
milda: varmeta,  
mola

ĉielo: la supraĵo, kie  
la nuboj pendas  
blua: kolorojn vidu  
sur la kovrilo de  
la libro!

blua estas kruco en  
finna flago kaj  
floro de anemono  
oni ridetas ne/aŭd-  
eble per pli-malpli  
fermita buŝo  
amaso: granda  
kvanto kune  
krusto: malmola  
supraĵo



degel/inta: kiu degelis  
 degeli: malglaciĝi  
 skii: vidu bildojn  
 ski/bastono dorso/sako  
 rando: simila al bordo ekzemple inter kampo kaj arbaro  
 vilaĝo: multaj domoj kune  
 bon/ege = tre bone

promesi: certigi, ke oni donos  
 pagi: doni monon  
 gaja: ĝoja kaj kontenta  
 prezo: = pago po kilogramo  
 adiaŭi: saluti ĉe eliro: adiaŭ!  
 pordo fermas la eliran truon de domo  
 dubi: esti necerta pri io, timi, ke tio ne fariĝos  
 sukceso: feliĉa fino  
 transporti = porti de loko al alia  
 riproĉi: admone mallauda  
 sen/kaŭz/e = sen kaŭzo


malvarmo el la akvo, **degelinta** pro la sunbrilo de la antaŭa tago. Estis do bonega neĝostato por skii. La fratoj elprenis siajn skiojn kaj skibastonojn kaj surmetis dorso-sakojn. Tiel ili eksciis al Urso, kiu loĝis ĉe la **rando** de la **vilaĝo**. La skioj glitis bonege kaj baldaŭ la pardo alvenis al la domo de Urso.

Urso bonvenigis la kokojn afable kaj **promesis** la terpomojn. Prenu en la sakon kiom ajn vi povas porti sur la dorso. Vi ne devos **pagi** pli multe pro tio.

**Gajaj** pro la malalta **prezo** Keko kaj Riko plenigis siajn sakojn. Pro avido Keko prenis eĉ iom tro multe: estis al li malfacile levi la sakon sur la dorson. Tamen ili **adiaŭis** la afablan Urson, eliris kaj fermis la **pordon** post si.

Kial vi prenis tiel multon? demandis Riko. Mi **dubas**, ĉu vi **sukcesos transporti** ĉion hejmen.

Ne **riproĉu** min **senkaŭze**! La



skioj glitas bone kaj la **deklivo** fallas en la **direkto** al nia hejmo, ni ja loĝas en **valo**, diris Keko iom **fiere**.


La skioj vere glitis tre facile laŭ deklivo malsupren. Sed venis **mal-ebenaĵo** kiu ĵetis Kekon sur la dorson, kaj li restis kuŝanta en la **profunda** neĝo. Riko skiis rapide antaŭen kaj ne rimarkis la malfeliĉan okazaĵon.

Riko alvenis al la hejma pordo kaj ekhaltis mirante, kie Keko restis. Formetinte la dorsosakon kaj **lasinte** ĝin en la domo Riko rapidis reen per la skioj, kaj baldaŭ li trovis Kekon kuŝanta, ne povanta ekstari sur la skiojn. La frato tamen helpis lin el la **embaraso**, tenante kaj tirante lin per la manoj, kaj ĝoje ili kune skiis hejmen kun la granda **pakaĵo** de Keko.

Kaj Riko **konsilis** Kekon pensi alian fojon pri siaj fortoj, kaj ne preni troan **ŝarĝon**.

deklivo: surfaco kiu iras de alte malalten  
 direktoj: norden, suden &c  
 valo: malalta kampoj inter altaĵoj  
 fiera: sentanta sian bonecon  
 ebena: supraĵo sen altaĵoj aŭ malaltaĵoj  
 kuŝ/anta = kiu kuŝas  
 profunda: dika (pri akvo, neĝo ktp.)  
 miri: senti ion  
 stranga kaj ne-atendita  
 mir/ante = kaj miris  
 formet/inte = post kiam li formetis  
 lasi = restigi  
 re/en = al la loko de eliro  
 embaraso: malfacila stato

pakaĵo: aĵo kunmetita kaj ligita per ŝnuro  
 konsili: diri opinionon, kion iu devus fari  
 ŝarĝo: tio, kion oni portas




bona gusto == agrabla sento en la buŝo  
 labor/ema laboras volonte  
 tranĉ/ilo: vidu bildon!  
 tranĉ/i: labori per tranĉilo  
 ŝelo: pli malmola supraĵo de fruktoj kaj similaj  
 kuiri: prepari (manĝon) en akvo bolanta  
 kuir/ota == kion oni kuiras  
 plaĉas: estas agrabla  
 marŝas: antaŭeniras  
 agas: uzas laborilon, pensas kaj laboras  
 vigla: rapidaga kaj gaja  
 pruntitan oni devas redoni  
 okupi: preni por sia uzo  
 hezito: necerteco, timo  
 kuraĝo: maltimo  
 maniero: en kiu maniero == kiel

MARTO						
A	B	C	D	E	F	G
			1	2	3	4
5	6	7	8	9	10	11
12	13	14	15	16	17	18
19	20	21	22	23	24	25
26	27	28	29	30	31	

## 28. LA DANGEROJ DE TRANĈILO

La tuta familio ĝojis pri la ricevitaj bongustaj terpomoj. Eĉ la juna Poĉjo, kiu ordinare ne estas tre laborema, volonte prenis tranĉilon kaj komencis senŝeligi terpomojn kuiritajn. Keko venis rigardi, kiel la laboro sukcesas. Sed la laboro de Poĉjo ne plaĉis al Keko: al li ŝajnis, ke ĉio marŝas tro malrapide. Ĉu Poĉjo do timas la tranĉilon aŭ ĉu li estas mallaborema? Keko ekdiris kolere: Kial vi ne agas pli vigle? Pruntedonu al mi la tranĉilon kaj lasu min montri kiel oni tenas la tranĉilon!

Keko okupis la seĝon de Poĉjo kaj sen hezito kaj kuraĝe li ko-



mencis uzi la tranĉilon en maniero de majstro. Sed la tranĉilo estis pli akra ol li kredis. Apenaŭ li faris la unuan tranĉon, kiam la klingo tuŝis lian fingron kaj ruĝa sango ekfluis.

Keko nun sidas kaj pentas sian troan kuraĝon. La vundita mano estas ĉirkaŭita per bandaĝo, kaj Keko konsentas, ke oni devas esti pli singarda dum la laboro, kaj ne uzi akrajn laborilojn senzorge kaj forgesante la danĝerojn.


Sed Poĉjo daŭrigis malrapide la senŝeligon. Poste Patrino Koko kuiris la terpomojn en pura akvo kaj vaporo. Kaj ĉiuj kunvenis en la manĝoĉambro por manĝi la bongustajn kuiritajn terpomojn.

Keko sidas ankoraŭ tre serioza ĉe la tablo. Konsolas lin tamen tio, ke ne difektiĝis la dekstra mano, kaj li povas sen malfacilaĵo partopreni la manĝadon.

majstro: alte ŝatata instruisto  
 akra: tranĉopova  
 apenaŭ = ne pli ol  
 klingo: tranĉanta rando  
 ruĝaj estas framboj kaj vakcinioj  
 sango: la ruĝa fluajo de la korpo  
 penti: senti malĝojon pri malbona faro, kun volo ne plu fari tiel  
 vundi: kaŭzi difekton, el kiu fluas sango  
 bandaĝo: vidu bildon!  
 sin gardi: konduki tiel, ke malbona scito ne povu veni  
 zorgi: pensi pri rimedoj certigi bonan sukceson  
 danĝero: ebleco de malbono aŭ malfeliĉo  
 pura akvo: nur akvo kaj nenio alia  
 vaporo: akvo kiel gaso  
 kuirita: tio, kion oni kuiris  
 serioza = sen rideto  
 konsoli: mildigi la malĝojon



## 29. LA STRANGA NEĜULO




terglobo

des = laŭ tio, ankoraŭ  
 latitudo: larĝeco de la ter/globo, kalkulite de ekvatoro  
 grado =  $\frac{1}{360}$  de rondo (tricent-sesdek/ono)

egala = precize sama  
 tag/nokt/egal/iĝo: la tago kaj nokto estas egale longaj

klara ĉielo = sen-nuba  
 serena: sunplena, sennuba, ridanta  
 antaŭ/diri: diri, kio estas

Plej mirinda en la norda vintro estas la iom-post-ioma kreskado de lumo. La plej mallonga tago — en decembro — estas en tempo, kiam la vintro apenaŭ komenciĝis. Ĝi estas ofte senneĝa kaj tial **des** pli malluma, kaj ĝi ne daŭras pli ol 5 kaj tri kvaronojn da horoj, je la **latitudo** de 60 **gradoj**. Sed neĝas kaj ekfrostas, fariĝas vera vintro — kaj la tago plilongiĝas. La novjara tago jam estas ses horojn longa, kaj en komenco de februaro ĝi atingas 8 horojn. Kaj en marto, la dudek-unuan, okazas la tagnoktegaligo — la tago atingas 12 horan longecon. Ĉiutage post la novjaro oni povis rimarki la plilongiĝon de la tago, la suno grimpis pli kaj pli alten kaj ĝia varmiga forto kreskis. Kiam suno estis malalte, **klara** ĉielo signifis froston, sed nun jam **serenaj** tagoj,



dum kiuj la neĝo ekdegelas kaj moliĝas, antaŭdiras **printempon**.

**Kies** estas la domo, kiun ni vidis en tia, printempon antaŭdiranta, tago en marto? Estas la dometo de la familio Koko, kaj en **ties** korto ni vidis **strangan** neĝulon. Sed ni rakontu, kiel ĝi fariĝis.


La neĝo estis mola kaj facile formebla per **premado**, kaj la aero estis agrable milda. Keko kaj Riko eliris en la propran **ĝardenon** kaj komencis ruli grandajn neĝbulojn. La bulojn ili levis unu sur la alian. Riko prenis lignan **ŝovelilon**, per kiu oni forŝovelas la neĝon por malfermi vojetojn, kaj **provis** ĝin por ebenigi la kunligon de la buloj, sed tio ne sukcesis bone, pro la moleco de la ligno. Li do prenis anstataŭe **feran fosilon**, kaj nun la ligoj fariĝis **glataj**. Baldaŭ staris la korpo de la neĝulo. La kapo fariĝis el iom pli malgranda bulo, kaj ankaŭ la **ĉapelon** Keko faris el

printempo: degelo de neĝo kaj reviviĝo de la naturo  
 kies domo: kiu ĝin posedas?  
 ties korto: korto de tiu  
 stranga: nevidita, neatendita, mirinda  
 premi: teni forte per la mano por malvastigi, malgrandigi  
 ĝardeno: korto, kie kreskas fruktarboj ktp.  
 bulo: pli-malpli ronda objekto  
 ŝoveli: forpuŝi neĝon aŭ supraĵon de tero  
 provi ion: uzi ĝin por vidi, ĉu ĝi estas bona  
 kun/ligo: loko kie du aĵoj tuŝas unu la alian  
 fero: la plej multe uzata metalo (Fe)  
 fosi: fari truon en la tero  
 glata: tre ebena



ĉapelo: kapvestaĵo





brako estas elstar-  
aĵo, kiu finiĝas per  
la mano  
dentoj en la buŝo  
maĉas  
maĉi: malgrandigi  
manĝaĵojn en la  
buŝo  
haroj: maldikaj,  
longaj aĵoj sur la  
kapo  
nazo: per kiu ni  
spiras  
taŭgas: estas uzbla  
lign/ero: malgranda  
parto de ligno  
butono: fiksilo de  
vestaĵo  
kuir/ejo: ĉambro,  
kie oni faras  
manĝaĵojn  
radio-aparato (bildo  
sur paĝo 67)  
anonci: sciigi  
atend/eblo  
ataki = subite ek-  
bati malamikon  
suferi: sub/met/igi  
al malbonaĵo  
de/form/igos: ŝanĝos  
sian formon  
ombrelo: vidu bil-  
don  
guto: akv/ero

neĝo, same la **brakojn**. La okuloj fariĝis el lignokarbo kaj same la **dentoj** en la buŝo — la neĝulo ja devas povi ankaŭ **maĉi** la manĝaĵojn. **Harojn** la neĝulo ne bezonas, ĉar la ĉapelo kovras la kapon. Kiel **nazo taŭgas lignero**. Ankoraŭ la nigraj karberoj taŭgas por **butonoj** sur la jakoj. Tiel la neĝulo estis preta. Nur la ŝovelilon li ankoraŭ ricevis en la maldekstran manon.

La fratoj eniris. Riko iris en kuirrejon kaj Keko malfermis la **radion**. Tie oni **anoncis** pri la atendebla vetero: plivarmiĝos, kelkloke pluvos akvo...

Keko ektimis, kio okazos al la neĝulo, se la pluvo **atakos ĝin!** Ĝi ja **suferos** pro la varma akvo, eble eĉ degelos kaj tute deformiĝos! Mi devas helpi ĝin.

Keko elkuras tra la pordo kun **ombrelo** en la mano. Li tuj rimarkas, ke jam falas gutoj.

Sed nun la neĝulo staras **grave kvazaŭ** grandsinjoro, tenante ombrelon super sia kapo.

Kaj ĉiuj **preterirantoj** rigardas kun miro la neĝulon, kaj kelkaj el ili **mokas** pri ĝi.

Sed kiam Konjo vidis la neĝulon, ŝi tuj ekpensis pri enigmo kaj vokis Kekon kaj Rikon:

Fratoj, ĉu vi povas diri, kio estas tio:

**Muelejo** supre, tenejo malsupre, densa arbaro sur la muelejo; la muelejo havas unu pardonon, kvar fenestrojn kaj duoblan fumtubon, sed la tenejo estas senfenestra.

Keko: Estas homo!

Riko: Kiel povas esti homo?

Keko: Muelejo estas la dentaro, pordo estas la buŝo, fumtubo la nazo...

Riko: Jam mi scias: okuloj kaj oreloj estas la fenestroj kaj **stomako** la tenejo. Kaj la haroj estas la densa arbaro.

Konjo: Bone divenita! Vi ricevos sukeraĵojn kiel premion!

grava: fiera, grand-  
ŝajna  
kvazaŭ: tute simila  
al  
preteriri = pasi  
moki = malsate  
ridindigi

muelejo: bildo mal-  
supre

stomako: kien iras  
la manĝaĵo



## 30. PROVERBOJ

**kiam = je kiu tempo**

Kiam kato forestas, tiam la musoj festas.

Ne ĉiam daŭras malbona vetero, ne ĉiam daŭras homa sufero.

Dio: la plej supera estajo

**Dio** ĝuste faras, neniam eraras. Kiam kato jam formanĝis, forpelo ne plu helpas.

**kiel = laŭ kiu maniero**

sterni: ebenigi, larĝigi

Kiel oni **sternas**, tiel oni dormas. Unuj diras mensogon kiel veron,

sonorilo: aŭdebla rekonilo pendanta ĉe la kolo de bovinoj & aliaj bestoj

aliaj veron kiel mensogon. Neniu musoj pendigos **sonorilon** al la kolo de kato. Se vi iel povos, neniel lasu.

**kial = pro kiu kaŭzo**

ŝovi: en/puŝi fremda: ne/propra vazo: la ujo elektit: preni preferatan el multaj proponataj

Kial **ŝovi** la nazon en fremdan **vazon**.

Li tro rapidis, tial falis. Ĉial estu singarda **elektante** amikojn.

**kies = posedata de kiu**

posed/ata de iu = iu posedas ĝin

Kies gasto mi estas, ties feston mi festas. Ĉies hundo estas nenies hundo.

## Tabelvortoj (dua parto)

enhavo demando		respondoj				
		necerta	certa	tuta	ne/a	ekster tabelo
tempo	kiam	iam	tiam	ĉiam	neniam	je la tria horo
maniero	kiel	iel	tiel	ĉiel	neniel	ĝentile, kuraĝe
kaŭzo	kial	ial	tial	ĉial	nenial	pro via peto
posedo	kies	ies	ties	ĉies	nenies	mia, de la patro

## Specialaj uzoj de »kiel»:

Li salutis nin kiel la **posedanto** de la domo = estante la posedanto.

Li salutis nin kiel gastojn = ĉar ni estas gastoj.

Keko kuris **preskaŭ tiel** rapide (aŭ: same rapide, egale rapide) kiel Poĉjo.

preskaŭ = ne tute, sed ne mankas multe

## A P R I L O

A	B	C	D	E	F	G
						1
2	3	4	5	6	7	8
9	10	11	12	13	14	15
16	17	18	19	20	21	22
23	24	25	26	27	28	29
30						



Pro aprila ŝerco kaj ŝanĝiĝema vetero gardu vin zorgeme.

Post sunbrilo pluvo, post rido ploro.



### 31. DANGERA AVENTURO

En aprilo la printempo marŝas kun granda rapideco. La neĝo degelas, kaj ĉie estas aŭdeblaj agrablaj **sonoj**:\* **murmuretas** la riveretoj, kiuj estas plenaj de vigle fluanta akvo. La unuaj **kantobirdoj** jam revenis de sia longa vintra **vojaĝo** al malproksimaj, fremdaj landoj: la **muzika** kanto de **alaŭdo** sonas alte en la blua ĉielo. Dum kelkaj tagoj pluvas varmeta akvo el la nuboj, kaj kiam ili **dispeliĝas** — tio estas, la vento pelas ilin al ĉiuj direktoj — la suno brilas varme, kaj tiel el la tero kiel el la restaĵoj de neĝo leviĝas vaporo supren.

Estis tia suna tago en aprilo, kiam Keko kaj Riko eliris allogitaj de la freŝa vento al la bordo de lago. Tuj ili vidis, ke la glacio jam estas rompita. La **tento** (allogo al malbonaĵo) estis granda.

— Vidu, kiel grandaj glacipecoj naĝas sur la akvo! diris Riko.

— Ili estas vere grandaj pecoj de glacio, kiuj tie **flosas** — kiel oni diras pri senvivaj objektoj kiuj moviĝas sur la supraĵo de akvo. **Fakte** (= verdire), la glacipecoj estas kvazaŭ grandaj flosoj, diris Keko.

— Sed certe estus danĝera **aventuro** veturi per unu el ili.



— Mi tamen volus tion provi, ili vere allogas min. Ne estas danĝere, ĉar nur vento pelas ilin; se estus rapidflua rivero kaj akvo/falo, estus tute alia afero.

— Ne forgesu, ke la gepatroj admonis nin **eviti** la **malfortikan** kaj rompiĝeman glacieron kaj ne iri sur ĝin. Vi devas **obei** iliajn admonojn.

— Ne diru al mi **ordonojn**, respondis Keko. Vidu kiel granda kaj fortika peco de glacio estas tie, kie la bordo kurbiĝas internen. Sur tiu mi volas veturi.

Kaj Keko paŝis al la bordo kaj **saltis** sur grandan glacifloson en la **golfo**. Sed kio okazis? La printempa glacio estas malfortika kaj pro la bato de la salto la flosa tuj dispecigis kaj Keko falis en la malvarmegan akvon. Li ektimis, kaj **ekkriis**: vokis kaj petegis helpon. Forte, **laŭte** sonis liaj krioj, sed neniu estis proksima krom Riko.

Riko tamen estis **fidela** amiko de sia frato, kaj li tuj agis: li ne **perdis** eĉ unu sekundon por pripensado. Li kuris al la borda arbaro kaj prenis longan bastonon, veran **stangon**. Kaj tiun li puŝis en la golfon kaj **etendis**, ĝis Keko povis kapti ĝian finon. Nun Riko tiris forte, dum Keko tenis la stangon per siaj manoj. Kaj tiel ili kune sukcesis alteriĝi Kekon.

Ambaŭ fratoj kompreneble kuris rapide al la hejmo, por ke Keko ne malvarmumu kaj fariĝu malsana. Keko

\* Rigardu ankaŭ vortklarigojn sur la paĝoj 118--120.

tuj malvestis sin kaj kuŝiĝis en la **lito**, dum Riko alportis brullignon kaj komencis **hejti** la ĉambron, por ke estu varme al Keko. Patrino alportis **kruĉon** kun varma suko kaj **boteleton** da **kuracilo kontraŭ** (= por malhelpi alvenon de) malvarmumo.


Keko **humile** (= malfiere) petis **pardonon** pro sia troa kuraĝ/emo kaj promesis estonte memori la admonojn eviti danĝeron, kaj **atenti** pri ĉiu alia peto kaj **averto** de la gepatroj.

La patrino nenion diris, ĉar ŝi opiniis, ke la aventuro estis sufiĉa instruo, kaj ne estas necese plu averti Kekon kontraŭ rompiĝema glacio.



### 32. KEKO REGALAS PER FLANOJ

Feliĉega pri tio, ke li estas **savita** el morto per la energia agado de Riko, Keko decidis **aranĝi** (= estigi, ordigi) **festenon** por sia frato. Li **servos** bonan manĝaĵon: li volas mem **friti** **platkukojn** aŭ **flanojn**, kiel oni ankaŭ nomas ilin. Por tio li **hejtas** la **fornon** en la kuirejo kaj pretigas **paston** en larĝa ujo. Sur la varman platon de la forno li metas la **paton**, en kiu li fritos la flanojn kun **butero** (kiun oni ricevas el la **lakto** de bovinoj). Ĉion tion vi povas vidi en la unua bildo: Keko staras tie kun tranĉilo en la maldekstra mano. Kaj per la dekstra li tenas **kuleregon** en la ujo, kie li **miksas** la paston. El la pato jam levigis vaporo en la



aeron, kaj la **odoro** de la vaporo allogis Rikon kaj Poĉjon en kuirejon. Ili divenis, ke estos io bongusta por la buŝo, kaj venis por gust/umi (aŭ provi la guston).

— Ĉu vi jam **flaris** la odoron? demandis Keko. Nu, mi ja **intencis** (= pensis kaj volis) inviti vin al festeno, kaj nun vi vidos, kiel **lerta** mi estas. Mi tuj faros **vidindan** artaĵon per mia mano: mi **ĵetos** la flanon en aeron por turni ĝin kaj rekapti per la pato.

— Tion fakte mi ŝatos vidi. Estas **surprizo**, neatendita novaĵo, ke vi lernis la arton de kuirado kaj ricevis la **titolon** kaj gradon de **kuiristo**. (Kuir/isto vivas per la kuirarto, dum tiu, kiu kuiras okaze estas kuir/anto).

— Nu, mi estas nur kuiranto, sed mi povas konkuri kun la plej lerta kuiristo, **fanfaronis** tro fiere Keko.

Sed kio okazis? La flano fiksiĝis en la **plafono**.

— Estis ja mirinda artaĵo, sed ne tute tia, kiel vi fanfaronis, ŝercis Riko.

— Pro tio ne estas necese plori nek fluigi **larmojn** el la okuloj, diris Keko. Mi povas forskrapi la flanon el la plafono kaj savi ĝin de perdiĝo.





Dirite kaj farite. Sed Keko ricevis **ĉapon** (malgrandan kapvestaĵon) el la flano, kaj la amikoj iĝis preskaŭ senspiraj (ne tute, sed multo ne mankis) pro rido.

— Mi **sufokiĝos** pro rido, ĉesu jam, diris Poĉjo.

Keko daŭrigis la fritadon pli zorgeme, kaj baldaŭ pretiĝis granda amaso da flanoj.

Intertempe Riko kaj Poĉjo metis sur la tablon tri **tele-rojn**, kaj por ĉiu tranĉilon kaj **forkon**. Kaj nun la amikaro eksidis apud la festena tablo kaj **regalis** sin per la flanoj. Kaj certe la manĝaĵo bone gustis al ili ĉiuj. Kun bona **apetito** ili formanĝis ĉion ĝis la lasta peco. Fine Poĉjo demandis:

— Ĉu vi tute forgesis la trinkaĵon? Almenaŭ mi **soifas** kaj volus havi lakton.

Lakto estis alportata.

Sed la humoro de Keko ne estis tute bona. Nenion li volis **konfesi** al la aliaj sed li pensis **sekrete** (nenion dirante al ili), ke troa fanfaronado ne **valoras**, nek pagas sin: ĝi **kondukas** (irigas) neeviteble al honto.



Poĉjo frostotremas

### Proverboj (ant, int, ont)

Ŝvitas kuŝemulo manĝante, frostotremas laborante.  
Ploranton ni evitas, ridanton ni imitas (=faras same kiel li).

Kiu ridis eliranta, ploros revenanta.

Eliris ridante, revenos plorante.

Antaŭen volas la vivanto, malantaŭen rigardu mortinto.

Estinta amiko estas danĝera malamiko.

Suferinto pli valoras ol lerninto.

**Azeno naskinta, azeno mortonta.\*** (Azeno estas simila al ĉevalo; ŝerco oni nomas azeno iun, kiu nenion komprenas. — Naski — doni vivon al ido).

Uzu tempon estantan, antaŭvidu estontan, memoru estintan.

\* La senco estas: kiu jam faris sian servon, lin oni ne plu valorigas.

M A J O						
A	B	C	D	E	F	G
	1	2	3	4	5	6
7	8	9	10	11	12	13
14	15	16	17	18	19	20
21	22	23	24	25	26	27
28	29	30	31			






### 33. LA UNUA DE MAJO

La unuan de majo oni festas kiel la unuan tagon de somero: [la sezono (aŭ parto de la jaro), dum kiu la vivo de la kreskaĵoj estas plej riĉa kaj vigla], kvankam la varmo ankoraŭ dum pluraj semajnoj estas nefidinda — necerta. **Precipe** (aparte, speciale) dum la noktoj la temperaturo ofte falas sub nulon, kaj estas ankoraŭ tro frue fari printempan semadon.

La unua de majo do estas la **karnavala** tago en la Nordo. Tiam oni **distras** (ĝojigas, malenuigas) sin per diversaj amuzaĵoj kaj petolaĵoj (ŝercaj agoj). Ciu volas aĉeti al si almenaŭ unu **balonon**, plenigitan per gaso, kaj lasi ĝin **flirti** — moviĝi vigle kaj neregule — en la aero. Tial ankaŭ Urso volas eluzi la okazon kaj okupi sin kiel **vendisto**, por gajni monon. Li eliras kun granda **fasko** da balonoj vendotaj. Ili brilas en la suno kun multaj **koloroj**: **verdo** de herboj, ruĝo, **flavo** kaj bluo de printempaj **floroj**.

Ankaŭ Poĉjo venis al la **urbo** kaj **promenis** (iris, iradis) sur la **stratoj**, por rigardi ĉion. En iu stratangulo li **renkontis** Urson, la balonvendiston. Apude estis **grupo** da aĉetantoj, sed Poĉjo nur rigardis kun envio iom flanke, ĉar li ne havis la necesajn monerojn.

Al Urso estis tamen malfacile teni la faskon de balonoj samtempe kiam li **akceptis** (alprenis) monon,



donis la balonon kaj eble devis redoni troan monon. Li petis, ke Poĉjo bonvolu teni la balonfaskon intertempe.

Sed kiam Urso, la vendisto, faris la **komercon**, okazis malfeliĉa **akcidento**: Poĉjo estas malgranda kaj tiel **malpeza**, ke la balonoj povas porti lin, kaj li ekflugis en la aeron!

Urso postkuris kaj kriis helpon per laŭta **voĉo**. Porko nenion timis: li tenis **persiste** la faskon en la mano, kaj ne lasis ĝin forflugi kaj perdiĝi. Fine la vento puŝis lin kontraŭ **foston**, kiun li kaptis per la libera mano. Kaj nun la **minacinta** akcidento jam estis venkita. Urso alvenis kaj helpis Poĉjon malsuprengrimpi.

La malriĉa balonvendisto estis dankema al Poĉjo pro tio, ke li **ŝparis** al li per sia **heroa** (kuraĝega) ago la multekostan balonaron. Bonvolu, sinjoreto, li diris al Poĉjo, elekti al vi la balonon, kiun vi plej ŝatas.

Kun brilaj okuloj kaj danko sur la **lango** Poĉjo prenis balonon flavan kiel la floroj de **tusilago** (rigardu la bildon sur la malantaŭa kovrilo de la libro!), kaj Urso **donacis** (donis senpage) ĝin, bonvole kaj kun **plezuro**.

Poĉjo kaj Urso prenis la manon unu al la alia, kaj Poĉjo ekiris promeni kun Keko, ĝoja pri la feliĉa mateno.

## 34. DE PRINTEMPO AL SOMERO

La venko de la lumo **progresas** — ni restas ĉiam sur la latitudo de 60 gradoj. Se en marto la tago atingis la longecon de la nokto, en komenco de majo ĝi jam estas kun siaj 16 horoj duoble tiom longa kiel la nokto, jam nur 8-hora. Kaj antaŭ la fino de la monato ĝi atingas 18 horojn. Sed ne nur tio: la **krepusko** vespera kaj matena pli kaj pli lumiĝas kaj fariĝas pli kaj pli longa. Loĝanto de sudaj **regionoj** (landoj, terpartoj) apenaŭ povas **imagi**, kion tio signifas. La **sorĉa**, ĉarma lumo sen/ombra **penetras** (en- kaj trairas) ĉien, ĉirkaŭante kaj **volvante** la naturon kvazaŭ per malpeza, hela **vualo** (vestaĵo de kapo simila al reto kun malgrandegaj truoj kaj tre maldikaj fadenoj), kiu nenion kovras nek nevidebligas. Kaj tiu lumsorĉo estas tiel forta, ke ĝi superas la brilon de la luno, kaj neniu stelo sur la ĉielo estas videbla, kvazaŭ ili tute **estingiĝis** (perdis la lumon). Restas nur la luma tago kaj la sennokta nokto!

Intertempe la kreskajaro **vekigiĝis** el la vintra dormo. Jam meze de la neĝamasoj, la arbetoj, **salikoj**, montris siajn **burĝonojn**: ili dikiĝis, **ŝvelis**, kaj el sub la ŝelo **aperis** (ekvidiĝis) molaj, blankaj buloj, kiujn la infanoj nomas »katoj», kaj baldaŭ ĉi tiuj floraroj elpuŝis la flavajn **stamenojn**, kiuj poste allogas insektojn, antaŭ ĉio **abelojn**, al **kolektado** (serĉo kaj kunmeto) de la **dolĉa** (sukergusta) florsuko, **mielo**, kaj de la flava florpulvo. Kaj tuj post la fordegelo de la neĝo la kampoj verdiĝas per la ekkreskantaj herboj. Sed nur en majo la unuaj herboj montras florojn: la tusilago kun flava florfasko en



1 Pĉjo ĉe abeloj. — 2 Arbotrunko kaj kvar folioj. — 3 Branĉeto de paduso kun floroj. — 4 Konvalo. — 5 Betulo (alta arbo).

supraĵo de rekta trunketo sen branĉetoj aŭ folioj. La **radiko**, subtera parto de la kreskaĵo, pli poste en somero elpuŝas grandajn foliojn — kiam la floroj jam antaŭ longe estas **velkintaj** (mortintaj). Poste, ĉirkaŭ la mezo aŭ fino de majo, ekaperas la **anemenoj** kun bluj floroj, la arbo **paduso** elburĝonigas siajn longajn florarojn blankajn, kun forta agrablaodoro. Almenaŭ dum la unuaj semajnoj de junio ekfloras **konvalo**, la »maja lilio» kun siaj blankaj »sonoriloj». La progreson **kronas** fine la floroj de pomarboj kaj **sorpoj**, kiuj kvazaŭ somera neĝo vestas la arbojn. Sed tiam ni jam estas meze de junio.

Ne malpli ĝojiga estis la elburĝoniĝo de la folioj de multaj arboj. La blankatrunkaj **betuloj** unue elpuŝis tre malgrandajn, flaveverdajn pintojn de folioj, kvazaŭ orelojn de musoj — oni parolas pro tio pri musorelaj folietoj — dum la unuaj varmaj semajnoj de majo. Ĉio dependas de tio, kiom la noktaj frostoj — ankoraŭ oftaj en majo kaj eĉ en komenco de junio — malrapidigas la **evoluon**. Sed la folioj kreskas, pligrandiĝas, ilia verdo fariĝas pli **malhela**, kaj fine, post mezo de junio jam tute kaŝas la **nudecon** de la betulaj branĉoj.

Kiom da herboj elkreskis intertempe, kaj kiom da diverskoloraj floroj jam **ornamas** (plibeligas) la some-rajn kampojn, estas neeble rakonti. Ni nur **konstatas** (notas la fakton): la lumo kaj la someraj koloroj superregas la nordan naturon.

La bildojn de diversaj kreskaĵoj supre **menciitaj** vi trovos sur la lasta paĝo de kovrilo de ĉi tiu libro.


### 35. BUMERANGO SIN REĴETAS

En bela maja tago Keko kaj Riko faris **ekskurson** (promenon, eliron) al arbaro kaj herb.ejoj. Keko volis montri al Riko kiel lerta li estas. Li jam sekrete **ekzercis** sin en la ĵetado de **bumerango**. Kaj ekzercado ĉiam donas arton kaj **kapablon**. Vidu kiel lerte Keko ĵetas: ĉiujfoje la bumerango revenas al liaj piedoj.

Riko pensis, ke estas ia sorĉo aŭ **mistifiko** (ŝerca kaŝo aŭ mensogo) en tio. Lasu ankaŭ min provi, li petis.

Keko ĝentile permesis al Riko fari provon. Li ĵetis kun granda forto, kaj ambaŭ jam pensis kaŝe, ke la bumerango perdiĝos sen reveno.

Sed **terure**: kia estis la sorĉo de Riko! La bumerango revenis kun laŭta **bruego**, terure forta kaj sonora. Kaj dume ĝi estis sin ŝanĝinta en **aeroplanon**! Pro timo ambaŭ fratoj falas surdorse sur la herbejon.



Tamen, ne tiel grave: la aeroplano preterflugis **trans** la herbejon kaj malaperis malantaŭ la arbaro kaj **monto** (altaĵo).

Kaj fine eĉ la bumerango revenis!

Kies ĵeto estis pli bona, malgraŭ la **diferenco** (mal-simileco) en ekzercado?

#### Proverboj (at, it, ot)

Korvo ne blankiĝas lavate (= per lavado).

Ne bela estas amata, sed amata estas bela.

Ne ĉiu **insultato** (kiun oni forte mallaŭdas) estas **ŝtelisto** (kiu prenas sen permeso fremdan aĵon).

Kia regalato, tia regalado.

Vojon batitan herbo ne kovras.

Vazo rompita longe sin tenas.

Bone farita, multe gajnita.

Malbone **akirita** (ricevita), baldaŭ perdota.

Malantaŭe lasita, antaŭe trovota.

#### JUNIO

A	B	C	D	E	F	G
				1	2	3
4	5	6	7	8	9	10
11	12	13	14	15	16	17
18	19	20	21	22	23	24
25	26	27	28	29	30	








### 36. DANGEROJ DE LA ĈEFVOJO

Keko kaj Riko libertempas en somerdometo, kiu apartenas al ilia avo (patro de patro aŭ de patrino). Ĝi estas lia propraĵo. Ĝi kuŝas en bela ĝardeno apud bordo de lago, kaj granda arbaro estas proksime ĉiuflanke. Sed la ĉefvojo (granda vojo) ankaŭ ne estas malproksima. La fratoj, nepoj de la avo ludas kaj promenas ĉie en la ĉirkaŭaĵo, kaj ili ankaŭ venas al la vojo kun siaj ludiloj. Tie ili renkontas maljunan kapron kun longa barbo sub la buŝo, kiu avertas ilin: ne ludu sur la strato. Ĝi estas tro danĝera ludejo, kaj vi certe pentos.

Sed estas vane (sensukcese) ilin admoni, kiam ili ĝoje kaj vigle ludas. Por la skutilo kiel ankaŭ por la bela, ronda pilko la ebena vojo estas la plej bona ludejo!

Sed apenaŭ la maljunulo foriris, kiam aŭdiĝas trumpetado kaj aperas granda aŭtobuso rapide veturante. La knaboj diskuras por sin savi kaj ne restas tempo por zorgi pri la ludiloj. La aŭtobuso veturas rekte kontraŭ la skutilon kaj trans la pilkon. La unua



dispeciĝas kaj la dua krevas per bruo kvazaŭ pafado, kiam la aero estas elpremata per la rado de la aŭto.

Pli multe valoras la suferinto ol la instruisto. Sed la instruo per sperto ĉiam kaŭzas doloron kaj malĝojon. Tiel pensas la fratoj kiam ili varmkore karesas kaj ametuŝas la difektitajn ludilojn.

### 37. LA JOHANA TAGO



Unu hirundo ne alportas someron. Sed jam alvenis hirundoj en grandaj aroj. En longaj vicoj ili sidas sur la telefonaj dratoj, ili flugas rapide tien reen, konstruante siajn nestojn en la subtegmento, en dometoj, staloj (kie loĝas la hejmaj bestoj) kaj en aliaj konstruaĵoj, ĉiam aŭdigante sian ĉirpadon.

La kokoj kaj Poĉjo ĝuas la someron (sentas plezuron pro ĝi). Ili naĝas en la varma akvo de la lago kaj banas sin en la sunradioj sur la bordo, kies sablon la moviĝo de ondoj de la akvo faris ebena kaj mola. Poĉjo miris, kiel la sablo povas esti mola, kvankam ĝi konsistas el malmolaj pecetoj de monto aŭ ŝtono, sed Keko respondis, fiera pri sia scio kaj kono, ke la plej grandaj sableroj estas du milimetrojn longaj kaj larĝaj, kaj la plej malgrandaj apenaŭ mezuras kvinonon de milimetro. Do la haŭto ne sentas la unuopajn malmolajn sablerojn, kiam oni kuŝas sur ili.

Sed la amikoj ne nur ludas. Proksimiĝas la Johana tago, la festo de lumo, kiun oni tra/vivas en sabato plej proksima al la plej mallonga nokto; tiu daŭras ĉi tie nur kvin horojn, se oni kalkulas de sunsubiro ĝis sunleviĝo, sed ankaŭ tiu tempo estas tiel luma, ke



nenio malhelpas legadon de libro eĉ meznokte. Por tiu festo la amikoj volas ornami, aranĝi kaj beligi la dometon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. Por ebenigi la korton ili forigis kelkajn ŝtonojn; feliĉe tiuj eroj de la proksima monto ne estis tre grandaj, ĉiuj sub dek kilogramoj, tiel ke la knaboj havis fortojn por forruli ilin. Poste ili sternis kaj ebenigis sablon sur la korto. En la antaŭvespero de la Johana nokto ili prenis hakilojn. Keko kaj Riko decidis kolekti brulaĵon por la festa fajro, kaj al Poĉjo ili donis la taskon serĉi malgrandajn betulojn por ornami la korton, kaj aranĝi tie kvazaŭ malgrandan foliarbetaron, laŭbon. Ĉiu iris al sia direkto, sen protesto (kontraŭdiro) aŭ envio.

Poĉjo trovis densan betuletaron apud la vojeto kaj komencis tie uzi sian hakilon. Sed Keko kaj Riko iris al arbaro, proksima al la bordo, kaj purigis ĝin de sekaj branĉoj kaj falintaj arboj, kaj kolektis ĉion sur nudan ŝtonan terpinton, tute ĉe la bordo, por eviti bruldanĝeron. Ĉion aranĝinte ili fine ekiris hejmen laŭ la konata vojeto. Sed iel strange aspektis (ŝajnis) la pejzaĝo: betuletaro preskaŭ malaperis, kaj la dometo? Nenie ĝi estis videbla! Ĉu ĝi krevis kaj suprenflugis en la aeron?

Nenia akcidento tamen okazis. Nur la betularo transplantigis por ombrumi la korton. Poĉjo tie bonvenigas la fratojn kaj invitas ilin al tablo por kvietigi sian soi-



fon. Kaj tie li verŝas el kruĉo dolĉan sukcon en la glasojn por ĉiu laborinto.

Keko kaj Riko tamen opiniis, ke Poĉjo uzis iom tro da peno por la ornamado. Jam pli modera (netroiga) laboremo kaj diligento povus sufiĉi.

Restis ankoraŭ la kulmino, la supera punkto, de la festo: la bruligo de la Johana fajro malfrue en la nokto. La najbaraj (proksimaj) vilaĝanoj kolektiĝis tie. Iu muzikis kaj la aliaj kantis kaj dancis popolajn dancojn sur la borda ebenaĵo. Kaj kukolo kantis en proksima betularo: kuk kuk ku!

#### Proverboj (et, eg)

Malgranda birdeto, sed akra ungeto.

Hejma dometo estas kiel patrineto.

Neniu estas profeto en sia urbetto.

Granda nubto, eta pluvo.

Ŝteletiston oni batas, ŝtelegiston oni ŝatas.

Grandegaj estas la kornoj de bovoj transmaraj.

#### (ar, er)

Kiu timas bestaron, ne iru en arbaron.

Riĉulo havas grandan amikaron.

Ne iru al fremda an/aro kun via regularo.

Ĉio estas por li kiel polvo sur tero.

El lia mano ĉiu monero elglitas.

El malgrandaj akveroj fariĝas grandaj riveroj.

Hakado de ligno donas lignerojn.

Unu floro ne estas krono, unu monero ne estas mono.



Nigra ribo

### JULIO

A	B	C	D	E	F	G
						1
2	3	4	5	6	7	8
9	10	11	12	13	14	15
16	17	18	19	20	21	22
23	24	25	26	27	28	29
30	31					

## 38. LA MARĈAJ RUBUSOJ

La varmo pliĝas, kvankam lumo jam transiris sian kulminon. Ĉiuj **beroj**, la dolĉaj fruktoj de arbetoj kaj herboj, **maturiĝis** unu post la alia. La kokoj kolektis en la proksima arbaro ruĝajn **fragojn**, kiuj kreskas en malaltaj herboj, kaj en la propra ĝardeno nigrajn **ribojn**, la fruktojn de **kulturita** arbeto, kiel faris ankaŭ ĉiuj najbaroj.

Sed vizitante foje proksiman vilaĝon la fratoj renkontis **onklon** (fraton de patro aŭ patrino) **Gruon**, kiu venis de la marĉo kun **korbo** plena de flavaj beroj, kiuj aspektis tre **delikataj**.



— Kiujn berojn vi portas? Kaj ĉu ili estas maturaj, kvankam ili estas flavaj? demandis Riko.

— Ĉu vi ne konas la marĉajn **rubusojn**? Ili kreskas sur same malalta herbo kiel la fragoj. Unue ili estas ruĝaj, sed tiam ili ankoraŭ estas nematuraj kaj **acidaj**, sed kiam ili maturiĝas, ili fariĝas tute flavaj. Bonvolu gustumi kelkajn, diris onklo Gruo.

Keko kaj Riko gustumis kaj trovis la berojn tre delikataj kaj dolĉaj, vera **frandaĵo**.

— Ankaŭ ni ŝatus ilin kolekti, diris la fratoj.

— Venu kun mi, sur la marĉo ili kreskas **abunde**, estas malfacile iri tie ne paŝante sur ilin!

La knaboj sekvis la onklon kiu **gvidis** ilin sur la malsekan, profundan marĉon. Gruo estis lerta: li **simple** kaj senĝene saltis de unu **musko/tufo** sur alian. Sed la knaboj havis mallongajn **krurojn**: ili ofte falis inter du tufoj, kaj malsekiĝis al si la piedojn, ŝuojn kaj **ŝtrumpojn**. La kolektajo tamen valoris la penon: ĉiu plenigis sian korbon.

Gruo montris ankaŭ sian domon. Li estis fiera pri ĝi: tie oni povas samtempe manĝi kaj bani sin. Ĉu ne estas **praktike** (laŭcele)? La knaboj tamen ne tro ŝatis tion, ke la **pantaloj** kaj **kalsonoj** (subpantaloj) malsekiĝis dum la sidado.

La reveno hejmen estis eĉ pli malfacila, kun la plenaj korboj. Tamen, venkinte ĉiujn malfacilaĵojn kaj



alveninte sur sekan **grundon**, la knaboj revenis hejmen kontentaj pri la sukcesa ekskurso, kvankam ili ne volonte reiros en proksima estonteco.



### 39. KONJO VIZITAS LA SOMERDOMETON

Konjo venis viziti la knabojn en la somerdometo. Ĉar estas multe da nigraj riboj, ŝi volas kuir**supon** al la amikoj. Estas varma tago, ŝi malfermas la fenestron por ne sufokiĝi en la varmo de la kuirejo. La **receptan** libron, kiu enhavas klarigojn per **preparo** (pretigo) de manĝaĵoj, ŝi metas sur la tablon, kaj komencas miksi la erojn en **kaserolo**. La berojn kaj iom da akvo, kaj kvanteton da terpoma **faruno** (muelita), kiun oni unue devas forte malsekigi per guteto da akvo, ordonas la librc. Poste sukeron. Intertempe la vento turnas la paĝojn. Konjo alrigardas: iom da **saĵo** (kiun enhavas marakvo!) kaj **spicojn**: **cinamon** (bonodora ŝelo de sudlanda arbo). Ree la vento turnas: **ajlo** (akragusta, ronda **tubera** trunko de spicherbo) kaj **pipro** (sekigita frukto de transmara arbo, kun akra, **pika** gusto)



necesas. Ankoraŭ la vento turnas paĝojn: nun er/ig/ita **fromaĝo** (malmoligita lakto), **oliv/oleo** (flua »butero« de sudlanda arbo), kaj kio ankoraŭ? Iom da **ĉitrona ŝelo**.

Fine la supo estas kuirita. Ĉiuj eksidas ĉirkaŭ la tablo. Ili manĝas kun bona apetito post la agado ekstere, sed tamen ili iom miras pri la stranga gusto de la hodiaŭa kuirajo de Konjo.



Brasiko



Karcto



Pizoj

### 40. POĈJO NE KONDUTAS BONE

La duan tagon Konjo kuiris »someran supon« el novaj terpomoj kaj diversaj verdaj **legomoj**: **pizoj**, **brasiko**, ktp., kaj flavaj **karotoj** (radikoj de ĝardena herbo), en lakto. Ŝi aranĝis la tablon kun teleroj, kuleroj kaj glasoj, kaj krom la supo estis **pano** (**bakita** en forno el faruno) kun butero, kaj kruĉo da lakto! Post tio ŝi vokis ĉiujn al la manĝaĵo.

Eksidis ĉirkaŭ tablo Keko, Riko kaj Poĉjo, kaj Konjo servis ilin. Sed tuj eksidinte Poĉjo **renversis** (faligis) sian glason, kaj la lakto fluis laŭ la tablotuko. Poste li ekprenis sian kuleron — kaj faligis supon sur siajn





vestaĵojn. Kaj kiam li volis ekstari por forviŝi la **makulojn** de sur sia ĉemizo, li faligis la seĝon kaj renversis la laktokruĉon kun tuta **litro** da lakto.

Iel oni devas instrui bonajn **kutimojn** al Poĉjo. Oni enportas banejan **kuvon** kaj tabuleton (pecon da ebena ligno). Kaj Poĉjon oni sidigas en la kuvo tute nuda kaj senvesta, ĉar tiel li povas makuli nur sian haŭton kaj la kuvon, kaj ambaŭ estas facile laveblaj.

Kaj se la juna frato ne havus jam la nomon Poĉjo, oni nun nomus lin malpurulo. La **kompatinda** Poĉjo!

#### Proverboj (an, ist, ul)

Urbano vilaĝanon ne komprenas.

Regantoj **batalas**, **regnanoj** suferas. (Regno estas tero regata de iu)

Unufoje ŝtelinta restas ĉiam ŝtelisto.

Moneron ŝtelis: ho ŝtelisto! milojn ŝtelis: **financisto!**

(financo = granda monafero).

Granda parolisto, malgranda faristo.

Por vendisto mensogo estas necesa **apogo** (helpo, subteno).

Ne helpas spegulo al malbelulo.

Malriĉulo ne havas **parencaron** (parencoj: avo, onklo, frato ktp.).

Al feliĉulo eĉ koko donas ovojn.

Kontraŭ muŝoj **bravulo** (sentima), kontraŭ homoj timulo.

Ridas blindulo pri lamulo.

#### AŬGUSTO

A	B	C	D	E	F	G
		1	2	3	4	5
6	7	8	9	10	11	12
13	14	15	16	17	18	19
20	21	22	23	24	25	26
27	28	29	30	31		



Pinoj

#### 41. PLEJ BONE RIDAS KIU LASTE RIDAS


En aŭgusto daŭras la somera varmo, kvankam la tagoj jam mallongiĝis. Nun la luno regas la noktojn per sia plena beleco, kaj la steloj trembrilas milope.

La frusomeraĵoj jam velkis kaj estas anstataŭigitaj de **aŭtunaj** floroj, beroj kaj fruktoj. Maturiĝas la **framboj** en siaj arbetoj ĉe deklivoj kaj **rokoj** (ŝtonegoj), kiel dolĉaj, ruĝaj beroj, pli ĝuste ber/et/aroj, kiujn la infanoj ŝatas manĝi kaj kolekti. Kaj iom post iom ruĝiĝas ankaŭ la pli acidaj, delikataj **vakinioj**, kiuj kreskas en **pinarbaroj** malalte sur la tero, multegaj laŭ nombro kaj kvanto.

La birdidoj ankaŭ jam kreskis kaj fortiĝis — ili baldaŭ preparos sin al longa vojaĝo kaj neimageblaj penoj sur sia vojo al sudaj landoj kun varma vintro.

Iun belan tagon en aŭgusto Riko iris antaŭ la vesperiĝo al la bordo kaj ekvidis grupon, eble familion de





anasoj naĝi sur la kvietaj lago. Starante sur la boata al bord/ejo li ravite (kun viviga ĝojo) kriis al Keko:

— He, Keko, venu rapide ĉi tien! Venu vidi la ĉarmajn anasojn naĝi! Se vi rapidos, vi ankoraŭ povos vidi ilin, antaŭ ol ili malaperos.

Keko ekkuris borden laŭ la deklivo, falpaŝis kaj trans/kap/iĝis. Kaj tiel li ruliĝis ĝis la albordejo, kie li restis sidanta kun sento de kap/turn/iĝo, preskaŭ **sveno**.

Riko ekridegis: ĉu vi el/pensis novan rimedon por rapida atingo de la bordo?

Sed dolĉe ridante Riko malbone atentis pri si mem. Li tro multe paŝas malantaŭen kaj trans la randon de la albordejo li ekfalas, la dorson antaŭe, en la ondojn.


Estas la vico de Keko por ridi.

Sed ne gravas la akcidento: Riko nur ricevis freŝan banon en la varmeta, pura akvo de la lago.

Kies rido estis la pli bona?

## 42. TROA ŜPAREMO NE VALORAS

La **greno**, el kiu oni ricevas farunon por la ĉiutaga pano, jam estas rikoltita. Des pli allogas la beroj. Keko kolektis iun matenon tutan dikpaperan **skatolon** (ujon) plenan da framboj, kaj gustumis la delikatajn berojn, kiam li vidis, ke alvenos Poĉjo. Li konas la avidemon de




Poĉjo kaj volis kaŝi la berojn de li. Tie, apud la **sojlo**-ŝtono, sur kiu li sidis, kuŝis **mato**. Ĝi ja formis bonan kaŝejon. Nur rapide la berujon sur teron kaj la maton kiel kovrilon super ĝi!

Poĉjo gaje salutis: estas plezuro revidi vin ree, post kelktempa foresto! Ni **babilu** (parolu senĝene) pri la lastaj novaĵoj! Ne necesas seĝon alporti! Tie, sur la **mato** mi bone sidos.

Poĉjo parolis **sensencaĵojn** (sensignifajn aferojn) kaj Keko penis respondi al li. Sed liaj pensoj estis **distritaj**: ili ĉiam kaj iam revenis al la dolĉaj beroj, kiujn Poĉjo subpremas. Li tamen nenion diris pri sia **maltrankvilo** (malsereno, malkvieto): **avaro** (troa ŝparemo) malhelpis lin de tio.

Fine Poĉjo ekenuas kaj foriras, salutante: ĝis la revido! Kaj Keko malkovras siajn berojn — sed en kia stato! Tute dispremitaj kaj kunpremitaj! Ho **ve!** ili nenion plu valoras kaj tute ne invitas al gustumo!

Avareco **trompas** (erarigas) eĉ saĝulon (kiu multon scias kaj komprenas).



## Proverboj (ad, aj, ec)

Kia regalato, tia regalado.

Batado de vento ne estas prudento (saĝa pripenso).

Lernado havas maldolĉan radikon sed bonan efikon (sekvon).

Ripetado estas plej bona lernado.

Batadi (bati kaj bati, daŭre) la venton, faradi nenion.

Montradi la dentojn, profetadi la plendojn (ve/kriojn).

Neveraĵo estas malveraĵo.

Riĉaĵo riĉaĵon alvokas.

Bonaĵo donita ne estas perdita.

Tolajon (subvestaĵon) malpuran hejme lavu.

Ĉasaĵo ĉasanton ne atendas.

Riĉeco estas frato de fiereco.

Fiereco venas antaŭ la falo.

Amikeco aparte, komerco aparte.

Belecon taksas ne okulo sed koro.



## SEPTEMBRO

A	B	C	D	E	F	G
					1	2
3	4	5	6	7	8	9
10	11	12	13	14	15	16
17	18	19	20	21	22	23
24	25	26	27	28	29	30



## 43. HUNDETO EN MARDANGERO

Ju pli proksimiĝas la aŭtuno, des pli mallongiĝas ree la tagoj — la 22:an de septembro estas ree tagnokta egaligo kaj de tiam ĉiu tago pli kaj pli malsuperas la nokton en longeco. Des pli freŝa fariĝas ankaŭ la aero, kaj la akvo en la lagoj malvarmiĝas de tago al tago.

Antaŭ nelonge Keko kaj Riko ricevis junan **hundon**, kiun ili **deziras** (volas, emas, ŝatas) **eduki** (instrui, lernigi) fidela gardisto de la hejmo, gardisto, kiu ĉiam **bojas** (donas voĉan **signalon**), kiam fremĉuloj venas en la korton. La hundeto, ankoraŭ infaneca, kuras ĉien kaj tien, kaj jen ĝi venis al **kruta** (rapide falanta) rokobordo de la lago — kaj glitis en la akvon.

Hundo ne bezonas lerni naĝadon, ĝi scias **instinkte** (aŭtomate, sen lerno) fari la ĝustajn movojn. Sed la septembra akvo estis jam malvarma al ĝi, kaj la bordo kruta. Ne estis agrable al la kompatinda etulo! Sed subite ĝi sentis firman grundon sub siaj piedoj kaj ekstaris, kaj komencis boji, bojadi.

Riko kaj Keko alvenis. La hundo staris tute proksime al la bordo, **evidente** (klare videble) sur malprofunda **fundo** (tero subakva).



Venu, venu, kial vi ne **vadas** (promenas kun parto de kruroj sub akvo, la piedoj sur la fundo) al la bordo? Venu, he, he!

Sed la hundeto nur bojis tiel plende, ke oni devis vole-nevole **bedaŭri** (malĝoje kun senti) ĝin.

Tiam Keko ekpaŝis por preni la hundeton. Ho ve! Ne estis malprofunda akvo. La hundo staris sur malnova fosto, tute kovrita de akvo. Kaj Keko enakviĝis ĝis nazo kaj okuloj, kun ektimiĝo.

La hundeto ne perdis la saĝon sed **konservis** la egalpezon de **animo** (penso, sentoj). Ĝi simple faris du saltojn: unue sur la kapon de Keko kaj poste de la kapo sur la bordon. Tiel ĝi estis savita de **drono** (morto sub akvo).

Sed la aventuro de Keko ne estas finita. La stona bordo estas kruta kaj glitiga. Nur per helpo de Riko, kiu etendis sian manon, li sukcesis suprengrimpi.

Kaj nun **konvenis** (estis bone kaj preferinde) kuri al la hejmo por eviti malvarmumon kaj **kataron**.

\*

Kiu havas kataron, sentas kvazaŭ li havus aron da katoj en sia **brusto** (supra parto de la korpo, sub la kolo). — Ĉu vi komprenas la ŝercon?



#### 44. LA RIKOLTO DE TERPOMOJ KAJ LA SONGO DE POĈJO

Post ĝuo de libertempo sekvas laboro. Estis nun tempo rikolti terpomojn. Iun tagon senpluvan ĉiuj eliris por elfosi ilin kaj kolekti en korbojn, kaj poste verŝi el korboj en sakojn.


Sed Poĉjo ne bone **fartas** ĉe la laboro. Li komencas **oscedi**; estas ja varma tago kaj la laboro lacigas. Poĉjo do lasas la laboron kaj kaŝas sin malantaŭ arbeto. Tie li trovas malplenan sakon. Ĝi ja bone konvenas kiel dormosako. Poĉjo enrampas kaj ekdormas.

Ĉiuj aliaj laboras diligente. Baldaŭ ĉiuj terpomoj estas kolektitaj en la sakoj, kaj Keko kaj Riko komencas ŝnurligi ilin kaj transporti en **kelon**. Tie la sakoj estas ree malfermataj kaj la terpomoj rulataj laŭ dekliva tabulo en la ujojn de la kelo.

Sed intertempe Poĉjo **songas**. En songo li vidas, ke Keko sidas apud tablo kaj legas libron. Sed supre, en tenejo en la muro de apuda ĉambro, estas bera **konfitaĵo** (sukere konservitaj beroj), kaj Poĉjo ekde-







ziras la dolĉaĵon. Li elektas el la **bretaro** apud Keko la plej pezajn librojn, portas ilin en la alian ĉambron kaj konstruas altan **turon** el benketo kaj la libroj. Fine la alteco sufiĉas: Poĉjo jam atingas la breton, kie la konservujoj troviĝas.


Sed nun proksimiĝas paŝoj. Estas Keko, kiu eniras sen **frapo** al la pordo. Poĉjo timiĝas, perdas la egalpezon, falas kapo/piede sur la plankon — kaj vekigiĝas!

Poĉjo rigardas ĉirkaŭen. Ne libroj falas sur lin sed **kugloj**. Kaj estas tute mallume, krom **luko** supre. Kie li estas?

Fine li **konsciiĝas** kaj komprenas ĉion: la kugloj estas nur terpomoj kaj li mem ruliĝas kun ili el la dormosako en la kelon.

#### 45. LA KOMUNA MANGO

La parto/prenantoj en la rikolta labor/festeno devas ricevi manĝon, ĉar laboro malsatigas. Konjo kuiris grandan **poton** plena de terpoma supo. Kiam la supo



estis preta, ŝi petis Poĉjon iri kaj alvoki la kunlaborintojn.

Poĉjo eliris kaj vokis per laŭta voĉo, kaj ĉiuj kuregis en la manĝejon. Venis du **leporoj**, muso, hundo kaj ursido.

Teleroj sufiĉis kaj ankaŭ kuleron ĉiu ricevis. Sed tabloj mankis. Leporo kaj muso devis manĝi kuŝante kaj sidante sur la planko.

Sed bonegan apetiton ili ĉiuj havis. La supon ili manĝis ĝis la lasta guto.

Kiam fine estis trankvile en la ĉambroj kaj la gastoj foriris por laborfestena danco, Konjo kaj Keko eksidis apud la manĝilaro kaj **meditis** (pripensis), kion elpreni por kontentigi propran malsaton. **Taso** da kafo aŭ teo tamen ne sufiĉus. Sed eble kelkaj grandaj buterpanoj kun fromaĝo kaj **ĵus** (antaŭ momento) **melkita** (el bovin igita) lakto ĝis plue silentigos la **grumbladon** de la stomako (tiu **organo** aŭ parto de la korpo, kiu preparas la manĝaĵon por la bono de la tuta korpo).

»**Osto** (malmolaj partoj en la korpo) restas en la mano de la disdoninto.»



## Proverboj (ebl, ind, em)

**Tuso** (bruo por kiarigi la **gorgon** = la internan tubon de la kolo) kaj amo ne estas kaŝeblaj.

Facile rompebla, preskaŭ ne **riparebla** (rekonstruebla).

Neevitebla, nerifuzebla (rifuzi = malakcepti).

Sen peno demandebila, sed nefacile respondebla.

Fremda **mizero** (malriĉo, malfeliĉo) ridinda afero.

Vivis puninde, mortis hontinde.

Rapide direbla, tute ne farebla.

Nevidebla, netiminda.

**Heredo** (postmorta donaco) nefidinda, havaĵo fidinda.

Tro elektema nenion ricevas.

Singardeman Dio gardas.

## OKTOBRO

A	B	C	D	E	F	G
1	2	3	4	5	6	7
8	9	10	11	12	13	14
15	16	17	18	19	20	21
22	23	24	25	26	27	28
29	30	31				



## 46. LA FLUGANTAJ FOLIOJ — KAJ BULKOJ

La naturo vestas sin ree en riĉajn kaj abundajn kolorojn: la folioj de la betuloj fariĝas flavaj, tiuj de la tremoloj kaj sorpoj ruĝe **brunaj** — eble vi scias, ke tremolo estas arbo, kies rondaj folioj tremas en plej malforta vento. Sole la **pingloarboj**, pinoj kaj **abioj** kies tre maldikaj, pintaj folioj similas al metalaj pingloj, restas verdaj tra la tuta vintro. Nun la plej fortaj koloroj




konkuras pri brilo. Sed tiu **lukso** estas mallongedaŭra: baldaŭ la aŭtunaj ventegoj ekkaptas la foliojn kaj disflugigas ilin tra la aero, ĝis ili fine falas kaj kovras la teran **surfacon** (supraĵon) per mato, kiu aŭdeble susuras, kiam oni paŝas sur ĝi. **Poetoj**, kiuj **verkas** (faras) belajn **poemojn** (versformajn parol/turnojn), diras ke la naturo mortas. Sed fakte estas granda kaj efika **sindefendo** (malatako), **milito** kontraŭ la minacanta morto per malvarmo kaj frosto. Ĉiu viva suko estas fortirata el la plej delikataj partoj de la kreskaĵo, kaj restas por la vintra dormo nur la plej **rezistokapablaj** partoj, kiujn la frosto ne povas difekti aŭ kiuj estas **ŝirmataj**, kovritaj de la tero. La fluado de la sukoj ĉesas, la **fenomeno** (okazaĵaro) de la vivo preskaŭ ĉesas, sed la energio estas konservata por nova vekigo en printempo. La plej **koncentrita** (densa) estas la energio en la semoj.

En tia kolorriĉa aŭtuna tago Patrino Koko prenis farunon el la nova rikolto kaj komencis baki panon. Ŝi **knedis** kaj formis malgrandajn **bulkojn** el pasto kaj metis ilin en la varman bakfornon, sur metala plato.

Pro la hejtita forno la kuirejo estis tre varma kaj Patrino malfermis la fenestron.

Intertempe bakiĝis preta tuta platpleno da bulkoj. Patrino prenis la platon kaj volis porti ĝin al la tablo



ĉe la fenestro, por lasi la bulkojn malvarmiĝi. Sed je la mola **tapiŝo** sur la planko ŝi falpuŝiĝis. Kia akcidento! Ĉiuj bulkoj elflugis el la fenestro. (Tapiŝo estas pli delikata ol mato).


Kie estis niaj amikoj? Ili ludis en la korto, sub la fenestro. Kaj la varmaj bulkoj falis rekte super ilin.

Vi povas diveni, ke la ludantoj avide kaptis la bulkojn kaj manĝis ilin kun bona apetito. Poĉjo enrigardis por laŭdi la bone sukcesintajn bakaĵojn kaj postulis (ordone petis) aldone lakton!

#### 47. KEKO ESTAS ELPENSEMA

La vesperoj jam estas longaj kaj mallumaj, kaj la fratoj deziras legadi, kiam ekstere estas forta pluvo kaj ventego. Sed la **lampo** en la plafono ne donas kontentigan lumon por tio.

Keko kaj Riko vizitas la vendejon de **Vulpo**, la longvosta, flavruĝa **kuzo** de Hundo (kuzoj havas



komunan avon kaj avinon). **Vulpo prezentas** (montras) diversajn lampojn, kaj **rekomendas** kiel la plej taŭgan tian kun alta fosto, staranta sur la planko. La fratoj **aprobas** ĝin (konsentas, ke ĝi estas bona), kaj portas ĝin hejmen. Tie ili metas la seĝojn unu apud la alia sub la lampon, kaj vere estas laŭdinda ĝia lumo. Sed kiam alvenas Poĉjo, naskiĝas nova **problemo** por solvi: la lumfasko estas tro malvasta.

Nun montriĝas la el/pens/emo de **Keko**: li proponas plibonigon de la lampo. Kaj vere la nova formo, **kreita** (elpensita kaj el/laborita) de Keko estas **utila** (bone uzebla) kaj **praktika**: se oni fiksas plurajn branĉojn al la fosto, kaj lampon en ĉiu branĉo, ne estas manko de lumo por la triopa amikaro.

Jen vi vidas la **rezulton** de la penslaboro de Keko: ĉiuj fartas (statas) bone sub la **novmoda** (laŭtempa) lampo.

#### Proverboj (obl, on, op, dis)

Avarulo pagas duoble.


Certe, kiel duoble du estas kvar.

Komenco bona — laboro duona.

Ĉiuj milionoj konsistas el milonoj.

**Akiro** (ricevo) kaj perdo **rajdas** duope (rajdi = sidi sur sin movanta ĉevalo).

**Famo** (dis/irantaj paroloj) kaj laŭdo **disbloviĝas** kvazaŭ vento.




Vagĉnaro

NOVEMBRO							
A	B	C	D	E	F	G	
			1	2	3	4	
5	6	7	8	9	10	11	
12	13	14	15	16	17	18	
19	20	21	22	23	24	25	
26	27	28	29	30			

#### 48. JUBILEO DE LA ONKLINO

Estas granda festotago hodiaŭ: onklino, fraŭlino Kokinjo fariĝas kvindek jarojn aĝa. Ŝi estas fratino de Patrino, kaj la knaboj kompreneble vizitos kaj gratulos ŝin (deziros feliĉon al ŝi) en la jubilea tago. Estas ĉiam ĝojo antaŭpensi tian festan viziton: oni servos tie kafon kaj teon kun dolĉaj kukoj, pomojn kaj aliajn fruktojn, eĉ bombonojn, dolĉaĵojn faritajn el sukero kaj fruktosuko.

La nevoĵ de Kokinjo, Keko kaj Riko vestas sin per belaj vestaĵoj, kombas la harojn kaj poluras la ŝuojn per broso. Tiel aranĝitaj, en festa tualetoj, kun kravato ĉe la kolo kaj kun donaca pakaĵo en la mano ili ekpromenas al sia onklino. Survoje ili preteriras fer/vojan stacidomon, kie la vagonaroĵ kutime haltas. Tuj post tio ili alvenas al viadukto, ponto kondukanta trans la fervojojn. Je sia ĝojo la fratoĵ aŭdas bruon de



la vagonaro kaj la fajfon (akran signalon) de la lokomotivo, kiu ĝin tiras laŭ la reloĵ de la fervojo. La kokoj restas sur la viadukto por rigardi la preterpason de longdistanca vagonaro kaj por kalkuli la nombron de la vagonoĵ. La vapor/maŝino de la lokomotivo puŝas nigregan fumon, kaj ĝia fulgo nigrigas ĉion — sed la kokoj neniom atentis pri tio kaj daŭrigas sian vojon, kvazaŭ nenio okazis — kvankam la tuta vizaĝo, de la frunto sub la hararo ĝis mentono super la kolo, de unu orelo kaj vango, trans la nazon kaj duan vangon ĝis la alia orelo estas kovritaj per fulgo, ne parolante pri la bela tualetoj!

Alveninte al la onklino — nigraj kiel negroĵ (denaske nigraj homoj) aŭ kamen/skrap/istoj ili ricevas fortajn riproĉojn de la malfeliĉa jubileantino. Ŝi ja devas tuj prepari banon al la knaboj kaj lavigi iliajn vestaĵojn. Kaj de kie senedza (edzo = viro ligita al virino, lia edzino) fraŭlino trovas konvenajn vestaĵojn por la knaboj?



Fine puraj sed iom nekomforte vestitaj Keko kaj Riko sidas ĉe la festotablo kaj frandas. Kaj sur la tablo brilas ilia donaco, bela **kandel/ingo**, en kiu staras kandelo kun brulanta **flamo** (la videbla kaj lumiganta fajro).



#### 49. BONA KONDUTO SIN PAGAS

La grand aĝa avo Hundo posedas bonan sledon por transporti **varojn** (komercaĵojn). Ĝi estas konvene granda por puŝado per la manoj, kaj por sursido de kelkaj infanoj, kaj ĝi bone glitas sur la neĝo.

Iun tagon Riko vidis, ke Hundo venas hejmen kun la sledo malplena. Li diris:

— Ni prenu ĝin kaj glitu sur la deklivoj por nia plezuro.

Tio vere estus granda ĝojo, ĉar antaŭ ne longe falis la unua neĝo: la **griza** (malpura koloro inter blanka kaj nigra) aŭtuna naturo subite fariĝis alloge blanka kaj pura, kaj elvokis ĉiujn infanojn el la ĉambroj.

Keko kaj Poĉjo **ŝanceliĝis**, hezitis: ĉu Hundo donos ĝin?

Sed Riko ekiris kuraĝe: vi vidis, li diris memcerta. Kaj tuj li estis en la korto de Hundo.

— Hej, mi prenos la sledeton por kelka tempo! li kriis senĝene.



— Ĝi estas mia, respondis avo Hundo **severe** (forte, neafable). Vi ne prenos ĝin!

Revenis Riko hontema kaj senkuraĝa. Li ne bezonis informi (sciigi) pri la rezulto.

Sed Keko alten levis sian kapon. Mi provos mian **ŝancon** (eblecon de sukcesoj), li diris.

Keko aliris kaj salutis:

— Bonan tagon, avo! Ĉu vi afable permesus al ni gliti umi per via sledo?

— Kun plezuro! Nur zorgu, ke vi ne **kolizios** (kont-raŭveturos) kun arboj! Kaj antaŭ ĉio, ne iru al la vojo!

Keko kaj avo bonhumore diris »ĝis revido«, kaj Keko forpuŝis la sledon al la deklivo. Tie li kun Poĉjo kometis la gajan glitumadon.

Sed Riko pripensis ĝentilajn **morojn** (devigajn kutimojn).



## Proverboj (ej, uj, ing, il)

Mia loĝejo, mia regejo.

Ĉiu ejo estas varma, propra sidejo plej ĉarma.

Vendejo bona, tenejo pli bezona.

Sen laborejo kaj sen loĝejo estas nenia feliĉo.

En abelujon ne blovu.

Ne metu la nazon en fremdan ujon — vi havos punon tujan!

Pro amo al kandelo kato **lekas** (per lango) kandelington.

Tranĉilingo **protektas** (ŝirmas), tranĉilo vundas.

Kun urso promenu, sed pafilon prete tenu.

Birdo havas flugilojn por ke ĝi flugu.

Nova balailo bone **balaas** (forpuŝas kaj kolektas malpuraĵojn de sur la planko).



## DECEMBRO

A	B	C	D	E	F	G
					1	2
3	4	5	6	7	8	9
10	11	12	13	14	15	16
17	18	19	20	21	22	23
24	25	26	27	28	29	30
31						

## 50. LA KRISTNASKA ABIO

En tiu jaro la neĝo falinta en novembro restis jam **konstanta** (daŭra) sur la tero — ne ĉiam okazas tiel — kaj ĝojaj la homoj atendis blankan Kristnaskon. Ĉar se la tero restas griza dum la plej mallonga tago, la vintra sunhalto, la mallumo estas tro peza al la homa animo.



Kaj la tempo pasis ĝis la Kristnaska antaŭtago. Estis multaj laboroj far **endaj** ĝis la festa vespero. Keko ĵus enportis la abion kaj volis komenci ĝin ornamu, kiam li aŭdis frapon ĉe la fenestro: **Sciuro** tie venis kaj petis eniron pro la malvarma vetero. Keko invitis lin kun plezuro.

Vi ja povas helpi per ornamado de la abio? Mi intertempe zorgos pri kuirado de festaj delikataĵoj.

Sciuro saltis kaj grimpis, fiksitis stelon en la supro, metis kandelojn en la kandelingtonojn kaj fiksitis ilin sur la abiaj branĉoj. Sub la kandeloj li pendigis pomojn, kaj de branĉo al branĉo li **girlande** (kurba ornamaĵo, plej ofte farita el floroj kaj folioj) pendigis **argentebrilajn** »harojn de **angeloj**» (ĉielaj estaĵoj).

Keko eniris por rigardi la rezultojn de la laboro de Sciuro. Tre bela aspektis la ornamita arbo. Sed kion Sciuro faris el la **vato** (mola materialo, uzata ekzemple por bandaĝoj), kiu devis ŝajnigi neĝon sur la branĉoj? Ho, li konstruis por si neston el ĝi!






## 51. KEKO KAJ RIKO RICEVAS FREMDLANDAJN KORESPONDANTOJN

La festa antaŭtago progresis al vespero. Subite oni aŭdis bruon en la antaŭĉambro: la leter/portisto alvenis kaj faligis poŝton tra la letertruo en la pordo. Poĉjo tuj rapidis preni la **gazonon**, sed el la gazeto falis salut-kartoj (pecoj el dika papero, kiujn oni sendas per poŝto). Estis ankaŭ letero mirinda.

Keko kaj Riko kune studis ĝin. La poŝtmarkoj estis belaj kaj neniam antaŭe viditaj: unu portis portreton (bildon de persono) kun subskribo L. L. Zamenhof, kaj sur la alia estis teksto »Lingvo internacia, Esperanto«, kaj bildoj de du vizaĝoj (tiu flanko de la kapo, kie estas la okuloj), kiuj ŝajnis paroli unu al la alia. Sed al kiu estis la letero adresita? Sur la koverto (leterkovrilo) oni povis legi: Sinjoro Pupo Leporo, Keko-tie 12, SOMERO. Ĝi do ne estis por iu el la familio Koko, ĝi estis intencita por la najbaro. Kaj el kiu lando ĝi venis? Sur la poŝtmarko estis legeble: **Magyar posta**. Patro klarigis, ke tio signifas **hungaran** poŝton. Sed vi devas porti la leteron al nia najbaro, sinjoro Leporo. Li ja loĝas proksime, diris Patro.

Kaj la fratoj iris al la najbaro kaj sonorigis la pordan sonorilon. Sinjoro Leporo invitis ilin internen kaj





klarigis la tutan aferon. Li havas amikojn en la tuta **mondo**, tio estas, ĉie sur la terĝlobo, tamen ne en la spaco kaj aliaj steloj aŭ **planedoj**. Kaj li **korespondas** kun ili per Esperanto, la internacia lingvo. Ankaŭ vi povos havi amikojn por interŝanĝi leterojn kun alilandanoj, se vi lernas Esperanton. Tiam estos nur necese meti anoncon en gazeton, ekzemple en »**Heroldo** de Esperanto« (heroldo signifas »antaŭ-anoncanto«). La anonco ne kostas multon, kaj vi ricevos multajn respondojn.

Tiu estis la plej kara kristnaska donaco al niaj fratoj. Jam baldaŭ la profetaĵo de sinjoro Leporo **efektiviĝis** (fariĝis fako), kaj Keko kaj Riko studis la respondojn ricevitajn. Ili estis el multaj landoj **eŭropaj** kaj trans-

maraj. Kaj la knaboj tuj eklaboris pri respondoj. Ili elprenis **inkon** (en boteto) kaj **plumingojn** kun plumoj metalaj. Ĉe la serĉado de tiuj Poĉjo volis ŝerci pri tio, ke la vorto »plumo« havas du sencojn, la ornamaĵoj en la vosto de birdoj, kaj la pinto de ink skribilo. Kial vi ne skribas per viaj propraj plumoj? li diris. Sed la kokoj estis tiel forte **interesataj** (iliajn pensojn plene okupis la afero) pri la korespondo, ke ili estis **surdaĵ** al la paroloj de Poĉjo kaj ne donis al ili ian noton aŭ atenton. Poĉjo mem prenis paperon kaj **krajonon**, kaj komencis desegni — ĉar lia skribkapablo estis ankoraŭ tro mizera (mankhava). Sed la kokoj skribis plurajn leterojn kaj **sendis** ilin al la respondintoj, kun propralandaĵoj poŝtmarkoj, al **okcidento** kaj **oriento**. Ili dankis la eksterlandanojn pro la rapida respondo kaj petis daŭran korespondadon kun kelkaj el ili.

Kaj tiel ili ekhavis neatenditan ĝojon kaj plezuron por ĉiuj sekvaj jaroj de sia vivo. Tiujn ankoraŭ pliigis la legado de la esperantaj gazetoj, kiujn ili poste **abonis**, kaj de la libroj, kiujn ili **mendis** (sendigis) el librovendejo. Sed tio jam estas alia **historio** (rakonto).



## 52. KATO SURPRIZAS


Por danki sinjoron Leporo pro la bonaj konsiloj Keko invitis la tutan familion Leporo gastigi en la hejmo de la Kokoj. Por tio estis preparita bela kaj dolĉa kuko. Kato ĝin rimarkis kaj karese plendpetis pri peco por gustumi.

— Ne estas eble nun, diris Keko, ĉar venos gastoj.

Keko malfermis la manĝoŝrankon kaj metis la kukon sur breton. Kaj post tio li ŝlasis (fermis nemalfermeble) la pordan **seruron** (**mekanismo** por ŝlosi) per ŝlosilo. Kie malaperis Kato, li ekmiris, sed ne pensis pli pri tio, ĉar restis aliaj preparaj laboroj.

Post kelka tempo la familio Leporo venis: sinjorino kaj sinjoro Leporo kaj Leporeto. Keko bonvenigis ilin afable.

Nun estas tempo elpreni la kukon. Keko malfermas la ŝrankon per la ŝlosilo. Sed ĉu vi kredas, ke li trovas la kukon? Tute ne! Anstataŭe sidas Kato en la ŝranko, kun **kremo** (lakta surfluaĵo) sur la **lipoj** de sia buŝo. Kaj el la kuko restas nenio!





Pro la granda **domaĝo** Kato estas forpelata kaj komune **persekutata** (postkurata por puni).

Sed kiam Kato jam formangiĝis, pelado ne helpas.





### 53. VULPO PRUNTEPRENAS LIBRON

En la najbaraĵo loĝas Vulpo, parenco de la komercisto. Post la **Kristnasko** li venis al Keko kaj petis prunte libron. Keko donis ĝin kun hezito kaj admonis: nur ne forgesu reporti ĝin post la tralego!

Vulpo tion promesis. Sed plej facile promeso **rimiĝas** kun forgeso. (Rimo estas simila fino en du versoj). Kiam jam degelis la glacio kaj neĝo, Keko aliris por re/peti sian libron. Vulpo kun **mieno** (vizaĝostato) **ruza** (sekrete trompema) sed **seriozaspekta** (serioza estas trankvila kaj fidinda) diris: Tuj vi havos ĝin, kaj malaperis tra pordo.

Keko atendis kaj jam tediĝis. Li malfermis la pordon, kaj vidis, ke ĝi kondukas al dua korto. Kaj nenio el Vulpo estis trovebla.



Veninte hejmen li rakontis la aferon al amiko Urso. Urso promesis sian helpon kaj faris militan **planon**: Voku ankaŭ Rikon. Ni iros ĉiuj tri.

Veninte al la domo de Vulpo, Riko nun postulas la libron. Kaj Vulpo, same kiel Kekon, intencas trompi ankaŭ Rikon. Sed kio okazas? Aliflanke de la pordo staras gardistaro. Vane estas al Vulpo sin forsavi. Kaptite li estas kondukata, laŭ sia propra gvido, al la kaŝejo subtera. Kaj tie Keko ricevas sian libron.

»Ricevis Vulpo pro sia **kulpo**». (Kulpas tiu, kiu faris malbone). **Proze** (sen versformo) dirite: la malhonesta (trompemo, neplenumo de promesoj) kaj **krimo** (malbonfaro) ricevis **justan** (moderan, ne troigitan, sed ankaŭ ne tro mildan) punon, laŭ la merito. Sed ankaŭ Keko ricevis instruon tre valoran, kiun ni povas **esprimi** per du versoj:

De pruntita libro jen la **nepra** (neevitebla) sorto: ofte ĝi perdiĝas, ĉiam difektiĝas.



## VORTKLARIGOJ (al ĉapitroj 31—53)

31. **sono** ĉio, kion oni aŭdas  
**vojaĝo** iro, veturo al malproksima loko  
**alaŭdo** birdeto kiu kantas alte super kampoj  
**aventuro** neatendita, danĝera okazaĵo  
**averti** voli ne alproksimiĝi, ĉirkaŭiri malproksime  
**obei** agi laŭ admono aŭ ordono  
**ordoni** forte eldiri sian volon, atendante ke oni obeos  
**golfo** parto de maro kiu kurbe eniras en la teron  
**fidela** ne lasas sian amikon en danĝero  
**perdi** lasi malaperi; ne utiligi; ne gajni ion, kion oni povas ekhavi  
**etendi** puŝi malproksimen laŭlonge  
**hejti** varmigi per fajro ekz. ĉambron  
**pardoni** ne plu koleri pro malbona faro  
**atenti** aŭskulti, rigardi kaj fiksi en sian memoron  
**averti** rimarkigi pri danĝero aŭ malbono, por ke oni ĝin evitu
32. **festeno** festa manĝo  
**servi** esti utila aŭ afabla al iu per io  
**friti** prepari manĝojn kun butero (aŭ alia graso) per varmejo  
**kuko** bongusta manĝaĵo farita el faruno (= muelitaj semoj) kaj aliaj materialoj en hejtita forno  
**forno** fajrejo en ĉambro, por kuiri aŭ hejti  
**pasto** materialo el faruno kaj akvo aŭ lakto, por manĝaĵo  
**miksi** meti kune, per movado, diversajn materialojn  
**odoron** ni sentas (flaras) per la nazo  
**lerta** povas facile kaj bone fari ion  
**vidinda** estas io, kies vido donas ĝojn  
**artaĵo** objekto aŭ ago, kiun oni faris lerte  
**titolo** honora nomo, kiu montras la okupon de iu  
**fanfaroni** fieri pri meritoj, kiujn oni ne havas  
**sufoki** premi iun tiel, ke li ne povas spiri  
**telero** plata manĝujo  
**regali** iun: doni al li bonan manĝaĵon aŭ trinkaĵon  
**apetiton** havas tiu, kiu volonte manĝas  
**konfesi** malkaŝe diri siajn zorgojn aŭ krimojn  
**valori** havi grandan prezon, esti ŝatata
33. **fidi** kredi ke io estas certa  
**fidinda** kiun valoras fidi  
**karnavalo** festotago, dum kiu oni amuziĝas amase (ekstere, subĉiele)  
**amuzi** agrable kaj gajige okupi la pensojn  
**vendi** interŝanĝi objekton kontraŭ mono

- urbo** dense loĝata loko, kun regulaj vojoj, kiujn oni nomas **stratoj**  
**renkonti** trovi iun irante kontraŭ li  
**grupo** malgranda aro da homoj aŭ objektoj  
**komerco** interŝanĝo, aĉeto kaj vendo, kiel daŭra okupiĝo  
**akcidento** neatendita, malagrabra okazaĵo  
**persisti** daŭrigi malgraŭ malhelpaĵoj  
**fosto** staranta, granda kaj alta peco de ligno  
**minaci** promesi malbonon, punon; kredi malfeliĉon, akcidenton  
**riĉa** havas multe da mono kaj valoraj objektoj  
**ŝpari** uzi malmulton, meti la reston flanken por posta uzo  
**kostas** multe tio, kies prezo estas granda  
**lango** estas en la buŝo, per ĝi oni parolas kaj gustumas  
**plezuro** agrabla sento de bonstato kaj kontento
34. **progresi** antaŭenmarŝi, plifortiĝi, pliboniĝi
34. **imagi** vidi en siaj pensoj ion nekonatan aŭ malbone konatan  
**sorĉi** estigi supernaturajn okazaĵojn, ĉarmi, kaŭzi grandan plezuron  
**volvi** ĉirkaŭmeti ion ronde aŭ serpentlinie  
**veki** ĉesigi ies dormon  
**burĝono** rondajo sur branĉo, el kiu elkreskas folio aŭ floro  
**stameno** vira parto de floro, kiu portas la firopolvon  
**polvo** tre malgrandaj eroj de seka materialo  
**krono** ronda kunplektaĵo de floroj kaj folioj; signo de reganto, granda metala ringo kun multekostaj ŝtonoj sur la kapo  
**evoluo** iom-post-ioma natura ŝanĝiĝo, aliformiĝo, kreskado  
**nuda** senvesta  
**mencii** mallonge preparoli, nomi
35. **ekzerci** instrui, doni lertecon per ripetado  
**kapabla** povanta fari ion bone  
**teruro** granda timo  
**bruo** malagrabra sono
36. **barbo** hararo sub la buŝo, ĉe viroj  
**trumpeto** metala blovmuzikilo aŭ avertilo kornforma  
**sperto** kono aŭ scio akirita per tra/viv/aĵoj  
**dolori** kaŭzi malagrablan (korpan) senton
37. **konstrui** kunmeti el materialoj ekzemple domon  
**ĉirpado** sono de birdetoj, mallongaj sinsekvaj voĉetoj  
**banj** oni povas sin (aŭ alian personon) en akvo, sunradioj aŭ aero
37. **sablo** speco de tero, kiu konsistas el malgrandaj (0,2—2,0 mm) malmolaj eroj; en pura sablo herboj kaj arboj ne kreskas

- ondoj** regule ripetiganta leviĝo kaj malleviĝo de la surfaco de akvo
- ŝtono** malmola materialo el tero, iom grandaj pecoj de monto
- mezuri** konstati ekzemple la longon de objekto per komparo al konata longo (= mezuro, ekz. metro)
- haŭto** surfaco de la korpo
- tasko** farota laboro, limigita laŭ kvanto
- pejzaĝo** vidaĵo de tero, arbaro, akvo
- planti** meti herbon aŭ arbeton por kreski (en nova loko)
- kvieti** estas iu, kiu ne atentigas dolore pri sia ĉeesto, lasas ripozi kaj mem senmove ripozas
- peno** forta eluzo de sia laboro kaj kapablo
- popolo** granda aro de homoj el sama lando, kum sama lingvo
38. **matura** estas, kiu evoluis kaj fariĝis preta
- kulturi** plenumi laborojn, kiuj faras la teron fruktodona kaj kreskigas manĝeblajn herbojn, berojn kaj fruktojn
- deikata** agrable sentebla per tuŝo, gusto, aŭdo aŭ vido
- frandi** manĝi kun plezuro kaj senti bonguston
- gvidi** konduki montrante la vojon
- simpila** facile komprenebla kaj solvebla
- kruro** parto inter la korpo kaj piedo
- pantalono** vira vestaĵo, de la korpo ĝis la piedoj
39. **tubero** ronda parto de kreskaĵo, formaĵo sur la surfaco ktp.
- grundo** la surfaco de la tero
- piki** oni povas per ilo, kiu havas akran pinton
40. **baki** prepari per varmigo en forno
- tablotuko** kvarangula peco de maldika materialo, kiu kovras la tablon
- kutimo** maniero de konduto
- kompati** kunsenti ies malfeliĉon
- batalas** interbatiĝas
41. **aŭtuno** sezono inter somero kaj vintro
- sveni** perdi kapablon senti, aŭdi, vidi kaj movi sin, por kelka tempo
42. **sojlo** ŝtono aŭ dika tabulo sub la pordo
- mato** maldelikata kovraĵo de planko aŭ de objektoj
43. **ju** pli granda, des pli bona: kiom pli granda, tiom pli bona
- signalo** interkonsentita signo por averto
- konservi** ne perdi, zorgi ke io ne perdiĝu
44. **farti bone**: esti en bona stato de korpo kaj sano
- oscedi** malfermi la buŝon per forta enspiro, signo de laceco
- kelo** tenejo subtera, precipe por manĝaĵoj
- sonĝi** kvazaŭ vidi kaj sperti ion dum la dormo
- breto** tabulo kuŝanta, sur kiu oni metas librojn, manĝaĵojn ktp.

- turo** (parto de) konstruaĵo, pli alta ol la ĉirkaŭo
- frapo** bateto
- konscia** kun klara sento, vido, aŭdo kaj pensado
45. **taso** malgranda ujo por trinki, ordinare uzata sur telereto, 'subtaso'
- grumbli** murmuri por montri malkontentecon
46. **bruna** kvazaŭ malpura koloro flave ruĝa
- abio** pingloarbo, bildo sur paĝo 18 en la 9a ĉapitro
- lukso** malŝparemo por plezuro
- milito** montrado de malamikeco kontraŭ fremda popolo, per batado, pafado ktp.
- rezisti** kontraŭstari, ne submetiĝi, ne obei
- ŝirmi** kovri kaj defendi kontraŭ io malbona
- knedi** paston: preme miksi ĝin kaj pretigi por formado
- tapiŝo** luksa, delikata kovraĵo de planko
47. **rekomendi** ion: laŭdi ĝin, por ke iu estu preta akcepti ĝin
- problemo** demando aŭ enigmo, kies solvo estas grava por la praktiko
- rezulto** sekvo de pensado aŭ de laboro
48. **jubileo** festo pro grava dat/reveno
- poluri** glatigi la surfacon brila
- tualetto** tutaĵo de la objektoj, per kiuj oni vestas sin
- reloj** longaj feraj stangoj, sur kiuj ruliĝas la radoj de vagonaro
- distanco** mezuro de rekta vojo inter du lokoj
- fulgo** konsistas el karberoj
49. **ŝanceli** movi tien kaj reen por faligi, renversi
50. **far/endaj** laboroj estas tiuj, kiujn oni devas fari
- arĝento** blanka, valora metalo, uzata por moneroj
51. **marko** papera signo de pagita valoro aŭ por memorigo
- pri io**; ankaŭ monunuoj en kelkaj landoj
- nacio** popolo, regnantoj kun komunaj historio, kutimoj, lingvo
- spaco** tio, en kio troviĝas ĉiuj objektoj
- planedo** ronda granda objekto, kiu rondiras ĉirkaŭ la suno
- corespondi** interŝanĝi leterojn
- inko** kolora fluaĵo por skribado
- 'surda** kiu nenion aŭdas
- krajono** skribilo el ligna stangeto kun interno el karbo-simila materialo
- en oriento** suno leviĝas, en okcidento malleviĝas
52. **domaĝo** bedaŭrinda perdo
53. **plano** antaŭe pripensita agmetodo
- esprimi** eldiri sian penson, opinion aŭ volon

## LISTO DE GRAMATIKAJ ELEMENTOJ

(numeroj de ĉapitroj)

La (artikolo) .....	1
o (substantivo) .....	1, 3
a (adjektivo) .....	1, 3
e (adverbo) .....	9, 13, 25
j (multenombro) .....	1
n (akuzativo) .....	5, 6, 30, (almovo) 11, 13, 16, 17
tiel (same, egale) ... kiel (egaleco) .....	30
pli ... ol (komparativo) .....	4
(la) plej (superlativo) .....	13
nombroj .....	1—10, 14, 15
nombroj ordaj: .....	-a 5, kioma 19, -e 7
personaj pronomoj: .....	ci 25
mi 5, vi 6, li, ŝi 2, ĝi 5; ni, vi 6, ili 2; si, oni 10, 11	
posedaj pronomoj: mia &c .....	6
pronomtabelo; ĉi .....	16, 30
Verbo: as, is, os, us, u (finitaj formoj) .....	25
i (infinitivo) .....	7, 25
ant, int, ont (participoj aktivaj) .....	32
at, it, ot (    »    pasivaj) .....	35
ne (negativo) .....	1, nek 10
ĉu (demanda partiklo) .....	7
Prepozicioj:	
al 8, antaŭ 11, apud 5, ĉe 6, ĉirkaŭ 9, da 5, de	
(poseda) 2, (loka) 16, 17, (tempa) 18, dum 20,	
ekster 11, el 9, 10, 17, en 6, 11, 12, ĝis 18, inter 19,	
je 18, kontraŭ 31, krom 19, kun 7, laŭ 19, 20, 26,	
malgraŭ 26, per 6, po 10, por 8, 11, post 7, preter 29,	
pri 8, pro 13, 23, sen 9, sub 5, super 5, sur 5, tra 11,	
trans 27, 35.	
Afiksoj:	
dis 31, 47, ek 6, ge 2, mal 1, re 8, 10, 12;	
ad 22, 42, aĵ 10, 42, an 20, 40, ar 9, 37, ebl 11, 42,	
ec 16, 42, eg 26, 37, ej 25, 49, em 45, end 50, er 29,	
37, et 15, 37, id 3, ig 8, 22, iĝ 11, 22, il 48, 49, in 2,	
ind 24, 45, ing 49, ist 40, obl 15, 47, on 21, 47,	
op 37, 47, uj 17, 49, ul 15, 40, um 21, 31, 37, 53.	

## TABELO DE ENHAVO

	paĝo
1. La kokoj (j, mal) .....	1
2. La familio Koko (in, de, ge) .....	2
3. Demandoj kaj respondoj (kio, kia, id, o, a) ..	4
4. Keko kaj Riko kalkulas (kiom, pli, ol, è) ....	5
5. Keko desegnas (n, kie, tie, u) .....	7
6. Konjo desegnas (ek, havas -n, as) .....	9
7. Keko skribas (i, e, ĉu) .....	12
8. Riko desegnas (ig, re) .....	14
9. Ludo pri strekoj (il, ar, ke ni faru) .....	16
10. Enigmoj pri kvaranguloj (aĵ, re, ĉi, oni) ..	19
11. Fenestro kaj spegulo (iĝ, ebl, sin), Lokoj (en -n) .....	23
12. Poĉjo malbonfaras (ig, e) .....	25
13. Poĉjo gajnas premion (kie, kien) .....	27
14. Nia mano (nombroj) .....	30
15. Pri bestoj kaj piedoj (nombroj, obl, ul) ....	32
16. Proverboj (tabelvortoj: kio, kiu, kia, kie, kiom; ec, ul) .....	35
17. La korvo sur la ponto (il, uj; ie, ien) .....	38
18. Poĉjo ne komprenas la horloĝon (kiam) ....	41
19. Leciono pri la tempo .....	44
20. La semajno (as, is, os, kiel -n) .....	46
21. La monatoj kaj la jaro (ebl, ec, on, um) ....	48
22. Proverboj (ig, iĝ) .....	50
23. La eterna kalendaro .....	51
24. La mirinda kaptaĵo de Poĉjo (ind, se -us)	52
25. La kaŝludo (ej), Proverboj (e, as, is, os, us, u, i) .....	56
26. Maidensa estas la nesto de pigo (it, ant, eg)	58
27. Keko kaj Riko aĉetas terpomojn (int, at)	61
28. La danĝeroj de tranĉilo (em, ot) .....	64
29. La stranga neĝulo (er) .....	66
30. Proverboj (Tabelvortoj: kiam, kiel, kial, kies)	70
31. Danĝera aventuro (um) .....	72

32. Keko regalias per flanoj (ind), Proverboj (ant, int, ont) .....	74
33. La unua de majo .....	78
34. De Printempo al somero .....	80
35. Bumerango sin rejetas, Proverboj (at, it, ot) .....	82
36. Danĝeroj de ĉefvojo .....	84
37. La Johana tago (op, um), Proverboj (et, eg, ar, er) .....	85
38. La marĉaj rubusoj .....	88
39. Konjo vizitas la somerdometon .....	90
40. Poĉjo ne kondutas bone, Proverboj (an, ist, ul) .....	91
41. Plej bone ridas, kiu laste ridas .....	93
42. Troa ŝparemo ne valoras, Proverboj (ad, aj, ec) .....	94
43. Hundeto en mardanĝero .....	97
44. La rikolto de terpomoj kaj la sonĝo de Poĉjo .....	99
45. La komuna manĝo, Proverboj (obl, ind, em) .....	100
46. La flugantaj folioj — kaj bulkoj .....	102
47. Keko estas elpensema, Proverboj (obl, on, op, dis) .....	104
48. Jubileo de la Onklino .....	106
49. Bona konduto sin pagas, Proverboj (ej, uj, ing, il) .....	108
50. La kristnaska abio .....	110
51. Keko kaj Riko ricevas fremdlandajn korespondantojn .....	112
52. Kato surprizas .....	115
53. Vulpo prunteprenas libron .....	116

Por daŭrigi la studadon

Nun, kiam vi atingis la finon de la Privilegia vojo vi povas uzi la atingitan lingvoscion por legado de literaturo. Eble vi povas, se vi estis atentema kaj diligenta, jam sen malfacilaĵoj kompreni kian ajn libron. Sed se vi sentas ian necertecon, volu komenci per facilaj legolibroj. Ni citas en ordo de plej facila al pli malfacilaj: Mary kaj Sulo, koresponda romaneto (15 paĝoj), E. Privat, Karlo, rakonto pri juna knabo (42 p.), Taglibro de kongresano ("turisma paroligilo por nova esperantisto), 24 p. J. Baghy, La verda koro, facila romaneto el la vivo de esperantistoj en Siberio (80 p.). Turnu vin al la eldoninto de ĉi tiu lernolibro.

Vilho Setälä.